

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 15, Februaro 2019



*Al la tuta mondo:*

*Bonvenon al la **verda** Gotenburgo!*

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

*[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)*

## Enhavo

Enhavo.....	2	Familiaj nomoj en Pollando, Litovio, Islando kaj Svedio, <b>Lasse Granat</b> .....	19
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	<b>Jan Hellström</b> fotis malsekterenojn en Hökälla, Gotenburgo.....	21
Espe-Porko meditas .....	3	La Serpentario.....	23
Vortoj survoje. La internacia tago de la gepatra lingvo .....	3	Verda flago pli ol lingva klubo.....	24
Internationella vänskapsveckan, sista veckan i februari.....	5	Informo pri Esperanto-instruado en Karl- skoga Popola Altlernejo, <b>Lars Forsman</b> .....	27
La granda malsanulejo... ..	6	Du popularaj TV-programoj .....	31
Niclas Sahlgren .....	6	Klassisk morgon i P2 – Med esperanto som modersmål .....	32
Sahlgren reaperas.....	7	Jen la Esperanto-programo en 2019 de la franca E-kastelo Greziljono .....	33
Paciento je la malsanulejo Sahlgrenska rakontas, <b>Lasse Granat</b> .....	8	Sommardagar i Göteborg – pröva en intensivkurs i Esperanto.....	33
Je komputila foiro Bill Gates komparas la komputilan industrion kun la aŭtoindustrio ..	9	Memoraj vortoj pri Jarl Hammarberg / Minnesord om Jarl Hammarberg.....	34
Kunstaru por la demokratio!.....	10	Purstila ceremonio por Ebbe Vilborg 1 februaro 2019 / En stilren ceremoni för Ebbe Vilborg 1 februari 2019 i Örgryte nya kyrka	37
Esperanto-Sabato la 2an de februaro .....	13	<b>Ebbe Vilborg</b> vizitis konversacian kurson en 2007 kaj prelegis pri sia laboro pri la esperanta etimologio / <b>Ebbe Vilborg</b> besökte en konversationskurs 2007 och föreläste om sitt arbete med esperanto-etymologi.....	38
Koncerto dum la Nacia festotago de la sameoj, la 6:an de februaro .....	15	Konversacia kurso en Herzberg, Germanio 18–22 marto 2019 .....	43
Lingvuzo .....	15		
Trezora ĉaso en la arta muzeo .....	16		
Skattjakt på Konstmuseet i Göteborg .....	17		
Krea skribado – laborejo .....	18		
Letero de Lucyna el Gdansko .....	19		

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@telia.com](mailto:ingegerd.granat@telia.com). Fina paĝarangô: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).



## Espe-Porko meditas



☼ Jam la printempo venis al Gotenburgo. Galantoj floradas.

☼ Pro la multaj paĝoj la artikoloj pri Ebbe

Vilborg kaj Jarl Hammarberg en la sveda kaj esperanto troviĝas je la fino de ĉi tiu numero. Gotenburgo do perdis du elstarajn konatulojn.

- ☼ La kovrila bildo montras parton de la hospitalo Sahlgrenska. Sahlgren estas la donacinto kiu ebligis la konstruadon de la granda hospitalo. Vi povas legi pri li en ĉi tiu numero de Ora Ĵurnalo.
- ☼ Ankaŭ komputiloj povas malsaniĝi, ĉu ne?
- ☼ La semajno de la amikeco troviĝas inter la 18a kaj la 24a de februaro... Sed laŭ mi la tuta jaro 2019 devas esti la jaro de amikeco.
- ☼ Ĉiun jaron je la 27a de februaro oni organizas "la tagon de demokratio". Ingegerd kiel eksa politikisto en Gotenburgo estis invitita kaj ŝi kunprenis Siv. Ni do reprezentis la Esperanto-Societon de Gotenburgo.
- ☼ Bonege ke Johannes Marainen povis prelegi la 2an de februaro anstataŭ la parlamentano Robert Hannah, kiu ne povis veni, ĉar lia filo malsaniĝis. Li eble venos 18 junio. Johannes ĉiam ensorĉas la publikon pri la veraj rakontoj pri sia iama vivo en boacbredanta familio.

☼ Pro Johannes Ingegerd kaj Siv aŭskultis apartan koncerton de la samea kantistino Elin Teilus. Mirinda kantistino!

☼ De Pollando ni eksciis ke Sten

Svenonius estis la gasto ĉe Lucina kaj Elvira.

☼ Lasse Granat interesiĝas pri familiaj nomoj en Pollando, Litovio, Islando kaj Svedio.

☼ Birdoj ĉiam troviĝas en Ora Ĵurnalo.

Ingegerd trovis la serpentaron aŭ "la sekretarian birdon". Interese!

☼ Jan Hellström ofte fotas birdojn, sed ĉi tiun fojon la areo de Hökälla estas sen birdoj, sed kun akvo!

☼ Se vi hezitas skribi artikolojn por Ora Ĵurnalo, unue legu la artikolon de Monica pri krea skribado!

☼ Lars Forsman kree skribas. Li eldonis librojn kaj en la sveda, kaj en esperanto. Ĉifoje ni ricevis Informon pri Esperanto-instruado en Karlskoga.

☼ Ni provas starigi paĝon por lingvodiskutoj, kaj ni bonvenigas viajn kontribuojn! Unu el tri personoj respondos vin – Inga, Andreas aŭ Folke, sed ĉiu povas skribi komentojn!

*Espe-Porko meditis kaj Siv skribis.*



## Vortoj survoje. La internacia tago de la gepatra lingvo

La 21an de februaro ja estas la "Internacia Tago de la Gepatra Lingvo". En Svedio ni diras "La Patrina lingvo" – Modersmålet. Kion vi diras en Pollando, Francio, Finnlando kaj en aliaj landoj?

Inga, Ingegerd kaj mi starigis etan esperantan ekspozicion en la biblioteko de Backa kaj

deĵoris dum 2½ horoj. La bibliotekistino Frida Svensson pruntedonis al ni tablojn kaj tabulon. Venis infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj, ne tro multaj, ne tro malmultaj. La tempo pasis rapide. Fininte sian laboron, Andreas vizitetis nin.





*Ingegerd je la ekspozicio. Mi fotis.*

Laŭ la ideo de Inga ni demandis al la prunteprenantoj, kiujn lingvojn ili parolas. Ĉiu elektis vorton aŭ mallongan frazon kaj skribis ĝin sur paperpecojn, kiujn ni metis sur vitran ŝrankon, kie la origamiaj belartoj de Inga troviĝas post alia projekto de ĉi tiu interesa biblioteko. Ni ricevis vortojn en la rumana, en dari (persa), en la araba, en tigrinja, en somala kaj en kelkaj aliaj lingvoj.



*Origamio estas belarto de paperfaldado, precipe laŭ la japana tradicio.*

Estas "origama rano" en la ŝranko. Junulo skribis tiun vorton en sia gepatra lingvo. Aliaj skribis salutfrazojn, kiujn ni metis sur la vitran ŝrankon.

Ni ankaŭ anoncis la someran intensan kurson kaj kelkaj personoj kaptis la ideon, dirante ke eble ili venos. Tri

personoj skribis siajn nomojn kaj ret-adresojn. Aliaj volis pripensi. "Ni revenos morgaŭ kaj transdonos la aliĝilojn", kelkaj junulinoj diris. – "Tiam ni ja ne estos ĉi tie" ni diris, sed la afabla personaro diris ke ili volonte ricevu ilin kaj plusendu al ni. /Siv

# Internationella vänskapsveckan, sista veckan i februari

## El la retejo de SEF:

”Låt oss tända flammen för en gränslös vänskap. Dess ljus betyder rättvisa, broderskap, fred mellan människor och folk. För att denna flamma ska kunna lysa klarare i världen, arbetar vi för utbredningen av det neutrala internationella språket Esperanto. I hela den mänskliga kulturens tjänst ska det leva, blomstra och utstråla vänskapens ljus över alla gränser.”

På detta sätt annonserade industrimannen och pingstvännen Erik Carlén (1905–1986) för snart 50 år sedan idén om inrättandet av den årliga Internationella Vänskapsveckan, sedan dess en världsomspännande tradition i Esperanto-kretsar.

Carlén, som var vice ordförande i det internationella Esperanto-förbundet UEA (Universala Esperanto-Asocio), formulerade sin idé med hjälp av den enkla devisen: Förståelse + vänskap = Esperanto.

Denna enkla formel återspeglar idén bakom det internationella språket:

- kommunikation på jämställd nivå mellan människor och nationer;
- solidaritet mellan alla folk; och
- respekt för de mänskliga rättigheterna.

Allt sedan dess strävar Esperanto-grupper världen över, att under sista veckan i februari på något sätt uppmärksamma detta initiativ för att visa på att fred uppstår när man betraktar främlingen som sin goda vän.



## La internacia semajno de amikeco, la lastan semajnon de februaro

”Lasu al ni ekbruligi la flamon de amikeco sen limoj. Ĝia lumo signifas justecon, fratecon, pacon inter homoj kaj popoloj.

Por ke ĉi tiu flamo brilu pli klare en la mondo, ni laboras por la disvastigo de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto. En la servo de la tuta homa kulturo, ĝi vivu, floru kaj disradiu la lumon de la amikeco trans ĉiuj limoj”.

Tiel la industria entreprenisto kaj pentekostano Erik Carlén (1905–1986) antaŭ preskaŭ 50 jaroj proklamis la ideon pri establo de la ideo pri la ĉiujara internacia semajno de la Amikeco, post tiam mondvasta tradicio en esperantaj rondoj.

Carlén, kiu estis la vicprezidanto de la internacia Esperanto-Federacio UEA (Universala Esperanto-Asocio), formulis sian ideon per helpo de la simpla devizo: Kompreno + amikeco = Esperanto.

Ĉi tiu simpla formulo spegulas la ideon malantaŭ la internacia lingvo:

- Komunikado egaleca inter homoj kaj nacioj
- solidareco inter ĉiuj popoloj; kaj nacioj
- respekto al la homaj rajtoj

De tiam Esperanto-grupoj tra la tuta mondo strebas dum la lasta semajno en februaro, iel atentigi ĉi tiun iniciaton por montri ke paco ekas kiam oni rigardas la fremdulon sian plej bonan amikon.

*Ĉu estis Kurt Frisk el Skövde, kiu desegnis la simbolon? /Siv*

# La granda malsanulejo...

Post la 1:a de januaro 1997 unuiĝis la tri urbaj hospitaloj, Sahlgrenska en Gotenburgo, la Hospitalo en Mölndal kaj la Orienta Hospitalo (nome Östra). Tiel estas la malsanulejoj parto de okcidenta Gotio.

Dum 2019 oni kalkulas la budĝeton al 1,7 milionoj kronoj. La hospitaloj havas 17000 dungitojn kaj praktikadojn en kvin lokoj en Gotenburgo, "Sahlgrenska" (en Gotenburgo), "Mölndal Hospitalo", "Orienta Hospitalo", "Högsbo Hospitalo" kaj la psikiatra Hospitalo Rågård en Angered.

Troviĝas informo de la jaro 1665 pri malsanulejo, kiu ekzistis norde de "Kvarnberget", kie unu el la gotenburgaj trinkakvaj fontoj situas. Tiu hospitalo malaperis post la granda fajro 1721.

En la testamento de Sinjoro Sahlgren de la 8:a de decembro 1772 li skribis ke li volas ĉu fari hejmon por vidvinoj aŭ malriĉuloj, ĉu konstrui hospitalon.

La 17:an de marto 1779 li informis ke la donaco povus esti por malsanulejo.

La unua hospitalo situis sur la ejo, kiun oni nun nomas "Packhusplatsen". La unua paciento venis la 11:an de marto kaj nomiĝis



Peter Söderlund kaj li suferis de disenterio. La 24:an li eliris de la malsanulejo.

La tempo jam forkuris kaj nun ĉio estas ebla!  
La nova tekniko estas strangeĝa!

*/Ingegerd*

## Niclas Sahlgren

Naskiĝis 1701 kaj mortis 1776.

Niclas (Nicolaus) Sahlgren naskiĝis la 18:an de marto 1701.

Lia patro estis la magistratano Nils Persson Sahlgren kaj la patrino estis Sara Herweg.

La patro de Niclas mortis kiam la filo nur havis du jarojn. En sia junaĝo li estis konata al Jonas Alström kaj la amikeco daŭrigis dum la tuta vivo.





Niclas Sahlgren havis bonan reputacion pro sia propra persono, pro sia fideleco kaj ordemo. Li ankaŭ estis tre laborema. En 1729 li estis komercisto en Gotenburgo. Tie li akiris grandan riĉaĵon.

En 1733 li elektiĝis direktoro de la hindia kompanio kiun li servis ĝis 1768.

Niclas Sahlgren estis la granda donacinto en Gotenburgo. Li donis monojn por konstrui la Sahlgrenska malsanulejon. Li ankaŭ apogis

”Östads säteri”, kiu estis hejmo por orfaj infanoj.

Niclas Sahlgren estis estimata pro siaj donacoj. Ĉiuj en Gotenburgo estimis lin.

Tie en la hospitalo la vivo startis kaj finiĝis.

Ni dankas al Niclas Sahlgren kaj ĉiuj laboristoj kiuj daŭrigas ĉiutage batali malfacilajn malsanojn.

Koran dankon! */Ingegerd*

## Sahlgren reaperas...



– Tie mi staris antaŭ la preĝeja pordo, kaj vidante kaj aŭdante. Estis timegiga etoso, kiu kvazaŭ glaciigis la sangon en miaj vejnoj. Kaj tiam mi vidis, kiel malfermiĝis la funebra kapelo, kaj alta viro en malnovtempaj vestoj kaj blanka peruko eliris kaj tuj poste malaperis en la mallumo. Kuris famoj en la urbo, kaj multaj personoj estis influitaj de la rakonto de la sakristiano, aŭ vere mem vidis ion similan, kaj tio daŭrigis la famon.

Niclas Sahlgren fantomas. Li intencas certigi, ke lia monhavaĵo estas bone prizorgata. Li dormis maltrankvile kaj ekhavis malbonajn sonĝojn pri la maniero kiel la flegado de malsanuloj estas diversmaniere neglektata.

**Estas neĝo** kaj vintro. Antaŭ la preĝejo de Tölö estas nokto, kaj la horloĝo ĵus batis meznokton. Aŭdiĝas muĝoj de la malnova funebra kapelo, kiu troviĝas apud la preĝejo. Malfruaj hejmenirantoj de iu okazaĵo estas aŭdintaj obtuzaj sonojn, kaj disvastiĝis famoj.

La sakristiano malfruis iun malluman vesperon kaj poste rakontis, ke li aŭdis, kiel la vento muĝadis en la kronoj de la grandaj arboj, kiel la tero tremadis, kaj kiel obtuzaj paŝoj aŭdiĝis en la kapelo. Eĉ falis ŝtonego per terura krako el la ŝtona barilo ĉirkaŭ la tombejo, li rakontis.

Kio okazas pri liaj donacoj? Ĉu ili estas utiligataj ĝustamane, laŭ liaj intencoj?

– Milito! li ekkrias indigne.

– Imbeciluloj plenigas la stratojn de Gotenburgo, kaj la pundomojn oni fermis!

Ke oni ŝparis pri la flegado dum la 21-a jarcento estas tute klare al la maljuna donacinto.

– Mi iros Gotenburgen, li diras. Estos por mi plezuro tiri la flegadan direktoron per la orelo. – Tamen la cetera oficistaro vere ne pli taŭgas ol li. Tiuj uloj per etendita mano

direktas la trafikon en la inferon favore al pli prestiĝaj projektoj.

Niclas Sahlgren estas survoje al la urĝakceptejo de la Sahlgren-a hospitalo por formi al si juĝon pri la situacio: Kian helpon povas atendi la hodiaŭaj homoj? Tamen ege surprizate li vidas, ke tiuj, kiuj atendas ene, kuradas kaj rekuradas; kelkaj estas vestitaj per manteloj bluaj, aliaj per manteloj verdaj. Ankaŭ manteloj blankaj svarmas, ŝajne sencele. Iujn pacientojn li ne vidas. Neniu priatentas la maljunan donacinton. Eble ili eĉ ne vidas lin. Ian hospitalestron li ne trovas, kaj nun li ekiras per rapidaj paŝoj al la konsultejo psikiatra. Enveninte en la atendejon li sentas sin tre indignita. – Tie ĉi sidas amase la febluloj kaj psike malsanuloj! Ĉu mia mono ne sufiĉis por mildigi la suferadon de ĉi tiuj homoj? Por kio do utilis

ĉiuj danĝeraj komercvojaĝoj de la Hindia Kompanio?

Subite nigriĝas la tuta psikiatrejo. La kurento ekĉesis en la tuta domo. Mallumiĝas kaj nigriĝas. Sahlgren estas reiranta al la preĝejo de Tölö kaj sia loko en la funebra kapelo, kiun li unuafoje ekokupis la 10-an de marto 1776.

”Prefere mi evitu trafi ĉiujn ĉi diletantojn, kiuj ekrajdis siajn ĉevalojn por malŝpari la Hindian kapitalon malgraŭ la intencoj de la doninto.”

Li sentas sin tiom laca demandante sin, ĉu ili vere deziras, ke ĉiuj ĉi mense malsanuloj malhavu flegadon kaj kuracilojn. Ili ja povus ekaperi ie ajn kaj faraĉadi.

– Kio do estas okazanta pri la psikiatria kuracado, furiozas la olda fantomo Niclas Sahlgren revenante al la funebra kapelo en Tölö. *(Ingegerd)*

## Paciento je la malsanulejo Sahlgrenska rakontas



**La granda**, moderna teknika kompanio *Ericsson* havas multe da stresaj labortaskoj. Tial la kompanio unufoje dum la jardeko 1990 decidis studi la amplekson de streso inter la dungitoj. Pluraj miloj da personoj en diversaj laborejoj elektiĝis por tiu testo, inter tiuj mi mem. La testo procedis tiel ke ĉiuj donis sangospecimenon. Per tiu oni povus ekzameni la streshormonojn.

Post kelkaj semajnoj mi informiĝis ke mi devis doni novan sangospecimenon ĉar unu de miaj streshormonoj, *prolaktin*, ŝajnis tre stranga je valoro. Tial oni bezonis alian sangospecimenon. La nova testo indikis la saman abnorman valoron. Kuracisto, kiu analizis tion diris ke ĝi indikis hipofiztumoron.

Tiu tumoru devus esti forigita. Sed dum oni atendis operacion, mi ricevis injektojn kun medikamentoj kiuj tenus la tumoron en respekto kaj eble ankaŭ kunstreĉus ĝin. Rimedo vere estis necesa, ĉar la tumoru estis kreskinta jam supren al la granda cerbo kaj komencus kaŭzi difekton sur la opta nervo,



kiu kaŭzus blindecon post mallonga tempo. Mi do havis senkomparan bonŝancon ke *Ericsson* efektivigis tiun teston antaŭ ol mi blindiĝus!

Nu, mi ricevis injektojn regule kontraŭ la malĝustaj hormonvaloroj, ĉar estis kelkaj kiuj estis eraraj pro tiu tumoroj. Oni ankaŭ demandis min ĉu mi rimarkis iujn laktogutojn el miaj mampintoj, sed mi ne havis! La kuraco funkciis bone kaj la dato por la operacio prokrastiĝis iom post iom. Post kelkaj jaroj la operacio tute ekskludiĝis, la tumoroj estis tre kunstreĉita, la medikamentdozoj reduktiĝis grade kaj post ankaŭ kelkaj jaroj tute ĉesis. Bonan dankon, *Ericsson*!

Sed ne estis nur la malkovro de tiu tumoroj kiu efektivigis tiel pozitivan rezulton por mi pro la *Ericsson* testo. Dum multe da jaroj mia cerbo ekzameniĝis pri novaj tumoroj kaj post eble dek jaroj oni trovis kelkajn benignajn tumorojn, *menigeomoj*. Tiuj ne estis kanceraj tumoroj, sed ili estis iom tro grandaj kaj baldaŭ komencus premi sur pluraj sensoraj centroj en la cerbo kaj per tio perturbus ilin. Tiam tamen, operacio estis

necesa. La kirurgo kiu plenumus ĝin, priskribis al mi detale la operacion. Li elsegus dek-centimetran truon en mia verto kaj elmetus la "golfpilkojn". Mi opiniis ke mi preskaŭ povus operacii min mem, se ne estus tiel ke mi devus dormi dum la operacio. Li tiam respondis ke estis ankaŭ kelkaj aĵoj, kiujn oni devus konsideri. Pri tio li lernis antaŭ kelkaj jaroj. Tial estis pli bone se li operaciis. Li faris tion, kaj estis tre bone, mi nur perdis la palposenton en tri fingropintoj je la maldekstra mano kaj en la maldekstra duono de la lipoj. Sed mi povas paroli kaj kanti sen rimarkeblaj eraroj, dum kontraŭe la ebleco por ludi la violonon, la gitaron kaj diversajn blovinstrumentojn malboniĝis. Se ne estas pli grandaj konsekvencoj kiam oni prifosas en la cerbo ol ke oni ludos iom pli malbone la violonon, oni ne rajtas plendi. Estas multaj homoj, kiuj tute ne povas ludi la violonon.

Do, denove, mil dankojn al *Ericsson* kiu malkovris la tumorojn, kaj al la malsanulejo, *Sahlgrenska Sjukhuset*, kiu ordigis tion!

*/Lasse Granat*



## Je komputila foiro Bill Gates komparas la komputilan industrion kun la aŭtoindustrio

(lam el facebook) /Siv

### Dator kontraŭ bil (förcortad)

*Vid en data mässa jämförde Bill Gates datorindustrin med bilindustrin och fastställde:*

*Om General Motors hade följt med i dataindustrins utveckling, skulle vi alla köra bilar med följande egenskaper:*

1. Utan någon anledning kraschar din bil två gånger om dagen.

### Komputilo kontraŭ aŭto (mallongita)

*Je komputila foiro Bill Gates komparis la komputilan industrion kun la aŭtoindustrio kaj konstatis:*

*Se General Motors estus sekvinta la evoluon de la komputila industrio, ni ĉiuj kondukus aŭtojn kun la jenaj ecoj:*

1. Sen iu kaŭzo via aŭto kraŝas dufoje tage.

2. Varje gång vägmarkeringarna målas om måste du köpa ny bil.
  3. Endast en person i taget kan använda bilen, såvida du inte har köpt Car 95 eller Car NT. Men då måste du köpa fler säten.
  4. Varningslamporna för olja, vattentemperatur och liknande skulle ersättas med en "allmänt-bilfel-varningslampa"
  5. Airbagfunktionen skulle säga "Är du säker" innan den löste ut.
  6. När som helst skulle din bil låsa ute dig och vägra släppa in dig (om du inte samtidigt drar upp handtaget, vrider nyckeln och tar tag i antennen).
  7. Varje gång GM lanserar en ny bilmodell skulle bilköparna vara tvungna att lära sig köra igen, eftersom ingen av kontrollerna fungerar som på den gamla bilen.
  8. Du skulle behöva trycka på startknappen för att stänga av motorn.
- PS! Som vanligt gäller att allt som finns i mejlet gäller till nästa mejl kommer ut. Med reservation för slutförsäljning.

2. Ĉifoje kiam oni rekolorigas la vojmarkaĵojn, vi devas aĉeti novan aŭton.
  3. Nur unuope vi povas uzi la aŭton, se vi ne aĉetis Car 95 aŭ Car NT. Sed tiaokaze vi devas aĉeti pliajn seĝojn.
  4. La avertlampoj por oleo, akvo-temperaturo kaj simile estus anstataŭitaj per universala aŭto-erara avertlampo.
  5. La "airbag-funkcio" dirus "Ĉu vi estas certa", antaŭ ĝi funkciigu.
  6. Kiam ajn via aŭto ŝlosus por vi la pardon rifuzante vin enlasi (se vi ne samtempe tiras la tenilon, turnas la ŝlosilon kaj ekkaptas la antenon).
  7. Ĉifoje kiam GM lanĉas novan aŭtotipon la aĉetanto devas lerni konduki denove, ĉar neniu el la kontroliloj funkcias kiel en la malnova aŭto.
  8. Vi devus premi la startbutonon por fermi la motoron.
- PS! Kiel kutime ĉio, kio troviĝas en la e-poŝto validas ĝis la sekvanta e-poŝto venos. Kun rezervo pri finvendado.

## Kunstaru por la demokratio!

*"Vi estas invitita al memortago por demokratio kaj homaj rajtoj, kontraŭ naziismo kaj politika perforto".* La invitantoj estis la Gubernia administracio de Vastra Gotio, la Universtato de Gotenburgo, La urbo Gotenburgo, la Konsilio por la nacia minoritato romaoj kaj la Juda Societo de Gotenburgo.

Ingegerd, kiel eksa politikisto, estis invitita kaj ŝi kunvenigis min. La unua bildo montras la guberniestro Anders Danielsson irante supren sur la ŝtuparo de la Universitata konstruado apud Vasagatan, Gotenburgo. Ĉirkaŭ la universitato staris policistoj. Ni registris nin, ricevis nomŝildojn kaj eniris en la impona granda lokalo.





**Georg Braun** de la juda kongregacio bonvenigis nin kaj informis pri la celo de la kunveno. La 27an de januaro estas la oficiala memortago de la Ekstermado, ĉar je tiu dato en 1945 Auschwitz estis liberigita. En la jaro 2000 la unua "Kunveno por demokratio" okazis en Gotenburgo kaj poste oni ĉiun jaron celebras la eventon.

Li demandis: Kiun respondecon ni prenas sur nin se ni vidas ke persono estas mokita pro raso, sekso aŭ kredo? Se oni ne reagas frue, oni pli kaj pli estos alkutimigita al la persekutado kaj faras nenion.

**Fredrika Lagergren**, la vicrektoro de la universitato, atentigis nin ke la malamo por fremduloj disvastiĝas en Eŭropo. Ne nur en Hungario kaj Pollando la timo por fremdaj kulturoj estas videbla. La Juda Societo en Gotenburgo ekz. estis atakita. Sed eblas turni la evoluon en pli pozitivan direkton. Ni ĉiuj havas respondecon!


**Daniel Poohl** de la gazetoficejo Expo prelegis pri la temo: "Tiele ni savu la demokration". La dekstra populismo gajnas terenon, minoritatoj kulpiĝas pro la problemoj de la Socio kaj la demokratio estas minacata de totalismaj fortoj. Sed ankoraŭ ne estas tro malfrue turni la tendencon. Fakte la problemoj ne venis subite, de unu tago al alia. Oni povus sperti la signalojn. Kiam registaro malsukcesas, la regantoj serĉas kulpulojn – kaj ofte oni kulpigas minoritatojn. Burokratoj faras kiel ili estas ordonataj.

Dekstraj ekstremuloj volas haltigi la evoluon kaj reiri al iamaj pli "sekuraj tempoj" kiam virinoj kaj viroj havis malsimilajn taskojn. Viroj ne volas la konkurencon de virinoj. Virinoj estos la malgajnintoj. Patriotismo estas brakumita. Oni fermas la limojn de la landoj. Strukturoj, kiujn ni konstruis, la dekstruloj volas detru. Kiel estas ke tiom da amasoj povis doni siajn voĉojn al SD – (la Svedaj Demokratoj – ekstrema dekstra



partio). Nu, ĉar la distanco de la centro de la potenco kaj la periferio iĝis tro granda. La dekstruloj donas simplajn respondojn al komplikaj instigoj.

La kvarpersona **Gestaltensemblen** ludis muzikon de Terezienstadt. Ĉi tiu koncertejo



estis speco de montrofenestro por vizitantaj nobeluloj kaj eksterlandanoj de diversaj organizoj. Judoj povis moviĝi en sufiĉe granda areo kaj ili povis havi teatraĵojn, koncertojn



k.t.p. (komparu kun "Kelkaj el ni" de numero 11, sid 31 de Ora Ĵurnalo!). Gestaltensemblen ludis muzikon, komponita en Terezienstadt.

Vere dramatike! Oni preskaŭ sentis la doloron kaj timon de la malliberuloj.



**Annika Thor.** Mi memoras ŝin kiel la verkiston de "En ö i havet" (Insulo en la maro) – kortuŝa libro kaj filmo pri du judaj knabinoj de Germanio, kiuj venis al Svedio por eviti la perfortaĵojn de la naziistoj.

Hodiaŭ ŝia temo estis: Estas tempo komenci estingi la fajron nun!

La fajro de la malamo disvastiĝas kaj ni devas agi NUN! En multaj landoj oni forbruligis sinagogojn. Neniu kuraĝis estingi la fajrojn. Ankaŭ en Berlino sinagogo ŝajne sekvus la saman sorton. Sed Wilhelm Kreuzfeldt, la ĉefo de la fajrobrigado, tenis sin al la koncepto de sia vivotasko – neniam lasi la fajron venki. Li deklaris ĉies egalecon antaŭ la leĝo kaj devigis la fajrobrigadanojn labori. Kaj li savis la sinagogon, nur etan parton oni devis ripari.

Annika Thor pledis por la rajto publikigi sin Interrete. Sed persono kiu skribas disputvekan tekston devas esti preparita por debato, malamo k.t.p. se la ideo ne sekvas la majoritatan sintenon. La libereco esprimi sin tamen estas sankta.



**Junula engaĝiĝo.** Poste sekvis panelan diskuton pri demokratio, parolibereco kaj la bona interparolo. Gejunuloj de diversaj organizoj partoprenis. Ili vere vekis respekton. Kun tiaj maturaj gejunuloj la batalo por demokratio sukcesos! Junuloj devas trovi bazojn por ilia agado kaj politikistoj devas aŭskulti ilin.

### **La guberniestro Anders Danielsson finis la eventon**

Ne nur ĉirkaŭ 6 milionoj da judoj, sed ankaŭ milionoj da romaoj estis persekutitaj kaj mortigitaj de la naziistoj. En la halo estas ekspozicio pri la vivkondiĉoj de romaoj. Dum la paŭzo ni havis tempo rigardi ĝin – tre bone farita.

Scio, informo kaj dialogo – jen vojoj por solvi la problemojn. Oni povas reagi diversmaniere kiam estas "fajro de malamo":

1. forkuri, 2. postuli ke iu ajn faru ion, 3. estingi la fajron per sitelo da akvo... se vi ne havas sitelon, prenu glason da akvo... se vi ne havas glason, preno

kuleron da akvo... sed faru ion!

*Mi estas dankema por ke mi povis ĉeesti tiun pensigan eventon! /Siv*



# Esperanto-Sabato la 2an de februaro

## Johannes Marainen rakontas pri la vivkondiĉoj de sameoj iam kaj nun



Johannes vere estas pedagogo. Por montri kiel ĉiuj trovis lokon en la samea kabano, li sidiĝas sur siaj kalkanoj montrante, ke ĉiu persono nur bezonas malgrandan spacon. Tamen en la edukpensiono por infanoj de boacbredistoj ne estis permesataj sidi tiele. Pli da spaco estis bezonata. Kune kun pli maljuna frato Johannes venis al la edukpensiono. La gepatroj ja sekvis la boacojn kaj ĉiam translokiĝis. La instruistoj ne kapablis paroli la samean, do ili malŝatis kiam la infanoj inter si parolis samee. La unua sveda vorto kiun Johannes lernis estis "björkris" – betulvergoj, uzata por puni la gelernantojn. Kiel 5-jarulo Johannes ne bone parolis la literon "r". Tagon post tago la instruisto diris "björkris" kaj Johannes imitis ŝin – dirante "bjöjkjis". Nova puno. Per amata avino iel li tamen sukcesis diri "björkris".



En 1960 Johannes translokiĝis al Gotenburgo kiel profesoro pri historio. Sed de tempo al tempo li komprenis ke mankas la vera historio pri la sameoj. Ekz. pri la kaŭzo de la Kalmar-milito la historiaj lernolibroj ne informas. Fakte estas la sameoj kiuj kaŭzis la militon!! Kial do? Temis pri impostoj. Ĉiam pluraj landoj impostis la sameojn, rusoj, svedoj kaj danoj – ĉiuj inventis kaŭzon por preni impostojn de la sameoj. Kaj nun en Kalmar oni pritraktis la problemon: Ĉu iu rajtas meti imposton sur la sameoj? Tiam oni ne diris sameoj, sed laponoj. Oni nomis la sameojn "laponacoj" en la norda parto de la lando – sed en la sudo sameoj estis rigardataj ekzotikaj.

Lingvaj problemoj abundis. Ĉar la svedaj lernejoj ne akceptis la samean, la vorto "modersmål" (la gepatra lingvo) nur temis pri la sveda.

Foje Johannes prelegis en la universitato kaj lia patro troviĝis en la aŭskultantaro. Poste Johannes demandis al li: Ĉu vi ŝatis mian prelegon? La respondo: "Mi ne komprenis vian prelegon, sed vi ja ricevis aplaŭdon, kaj ĝi do povas esti sufiĉe bona". Poste Johannes provis klarigi al sia patro pri kio temis la prelego. Bedaŭrinde li ne povis, ĉar mankis al li la sameajn vortojn. Li nun nur konis la sameajn vortojn kiujn li lernis kiel infano kaj la patro estis analfabeto. Kia ĉagreno!

Post multaj jaroj la infanoj de Johannes bedaŭris, ke ili ne kapablas paroli samee. Kaj nova ĉagreno por Johannes. Sed suna tago estis, kiam afgana rifuĝinto, loĝanta ĉe Johannes, nun komencas lerni la samean – la nordsamean lingvon. (Troviĝas kelkaj, kiuj povas esti same malsimilaj kiel la germana kontraŭ la sveda.)

Ĉar la svedaj aŭtoritatoj ne konis la samean, ili ne akceptis la sameajn nomojn. La vera nomo de Johannes estas:

*Lás Biet Heaihka Johánaš* = la nomo de la praavo: *Lars*, la nomo de la avo: *Per*, la nomo de la patro: *Henrik* kaj fine lia propra nomo *Johannes*.

Se vi volas sperti kiel estis vivi kiel boacbredisto vi povus legi la libron de Fatima Bremmer pri Ester Blenda Nordström, unu el la plej fascinaj virinoj dum la 20a jarcento. Ŝi "valrafis".

"Wallraffa" estas sveda vorto por ĵurnalista labormetodo, kiam raportisto prenas falsan identecon por tiele ricevi materialon por raportoj aŭ por libroj. Dum duona jaro Ester Blenda vivis kun sameoj en neĝstormoj en Laponio, nun nomata Sapmi.

Sameoj plej ofte estis kristanaj, ankaŭ la familio de Johannes. Foje la patrino de Johannes skribis leteron al la episkopo de Luleo, informante pri la malbona traktado de la gelernantoj en la nomada edukpensiono. Ekzemple oni altrudis la infanojn manĝi – eĉ se ili malŝatis la manĝaĵon. Frititajn tomatojn Johannes malŝatis. Oni premis lian nazon enmetante la tomatojn en lian buŝon, ĉar tiam oni estas devigita engluti la manĝon. Rezulto: Johannes ankoraŭ ne povas manĝi frititajn tomatojn. Ĉu vi pensas ke la episkopo plibonigis la metodojn en la nomada lernejo? Tute ne.

En 1956 estis artikolo en la gazeto *Norrlandsbladet*, kie oni skribis pri rasproblemoj. Sameaj gelernantoj volis studi en la gimnazio de Kiruna, sed ne eblis pro rasantaŭjuĝoj. Kaj je la sama tempo sameoj ne rajtis loĝi en hoteloj.

Nuntempe sameoj fieras pri sia deveno. Ili fieras pri sia bela flago, kiu estis enaŭgurita je la sama konferenco en Åre, la 15an de aŭgusto en 1986. Estis rezulto de konkurso, kaj la gajninta kontribuo venis de la artisto Astrid Båhl el Skibotn, Norvegio. La motivo devenas de la ŝamana tamburo kaj la poemo

"Paiven parneh" de la sudsameo Anders Fjellner.

La verda kaj blua koloroj estas la proporcio de tero kaj akvo. La flava suno donas vivon. La verda koloro estas la kreskaĵo. Ni, la homoj, bezonas la ruĝan fajron, kiu distingas nin de la bestoj. La cirklo signifas spiritecon. Samtempe la ruĝa duoncirklo signifas la sunon kaj la blua la lunon.


La 6an de februaro estas la nacia festotago de Sapmi. Sapmi ampleksas partojn de Norvegio, Finnlando, Rusio

kaj Svedio. Oni elektis tiun tagon ĉar la unua landa kunveno okazis en Trondheim la 6an de februaro en 1917.

Ni aŭskultantoj de la Esperanto-Societo de Gotenburgo tre dankas Johannes pro lia viva kaj engaĝiga prezentado. La 6an de februaro Ingegerd kaj mi aŭskultos samean koncerton.

Ĉi tiu flago belegas mian hejmon ek de la Esperanto-Sabato, kiam Johannes forgesis kunpreni ĝin – sed la 6an de februaro mi redonos ĝin lige al la koncerto. Nia esperanta verd-blanka flago ankaŭ belas, ĉu ne?

/Siv



## Koncerto dum la Nacia festotago de la sameoj, la 6:an de februaro

Elin Teilus kun bando prezentis novajn sameajn kantojn sur la scenejo de Stora Teatern (la Granda Teatro) de Gotenburgo. La kantoj troviĝas en ŝia nova albumo "Iellemij – To Life". La bando konsistas el ses muzikistoj kun diversaj instrumentoj. Elin mem traktis sorĉan tamburon. Je la fino de la koncerto ŝi eĉ inspiris la spektantoj al dancado.



Elin rakontis pri la fono de ĉiu kanto. La homoj kaj la naturo en la "arbarsamea" vilaĝo Udtja, Sápmi, inspiris ŝin. La nova gazeto Syre (Oksigeno) skribis pri la koncerto: "Kun ŝia unika ĉeesto kaj magika voĉo, ŝi vekas la voĉon de la boreala aŭroro kaj la primitiva forto de la tero".

Se vi pensas ke la plejparto de sameoj bredas boacojn, vi eraras. Nuntempe la plejparto de sameoj loĝas en Stokholmo kaj Gotenburgo. La samea

La Granda teatro estas pli malgranda ol la Urba teatro, sed ĝi havas etoson de malnovaj "gloraj tempoj". Ingegerd kaj mi, kiuj membriĝas en la samea societo de Gotenburgo, sidis sur la balkono, havis bonan vidaĵon sur la scenejo – kaj tro malgrandan lokon por la kruroj. Ĉiu seĝo estis okupita.

societo de Gotenburo havas ĉirkaŭ 350 membrojn. Sed krom la boacbredantoj ankaŭ troviĝas ekz. fiŝkaptistaj kaj arbaraj sameoj.

Estis vespero kiam oni vere celebris la vivon!  
/Siv

## Lingvuzo



Kompreneble ni volas disdoni bonajn broŝurojn pri Esperanto al personoj, kiuj montris intereson pri nia lingvo.

La jena okazis: Mi donis al du personoj la broŝuron *Nyckeln* – La Ŝlosilo. Ni alte taksas ĝin, ĉar ĝi enhavas "la tutan esperanton" en malgranda formato kun vortlisto.




Post kelka tempo venis retletero kun la teksto: "Mi trovis la vorton *negro* en la kajera vortlisto. Kiel estas ke vi arogas reteni tian malestimon vorton? Hontu!"



Mi respondis ke oni kompreneble ne devas uzi ĉiujn vortojn kiuj troviĝas en vortaro. Se oni forigas malestimajn vortojn kaj blasfemojn, la vortaro ne estus kompleta.

Supre bildoj de Nyckeln de 1930 kaj de 2008. En tiuj la pli moderna vorto *nigrulo* ne troviĝas.



En *Ordbok Svenska – Esperanto* de Ebbe Vilborg de 1992 ambaŭ vortoj troviĝas: *negro*, *nigrulo*, sen klarigo pri la nuancoj.

En la blua *Lilla esperanto-ordboken* de 1988 la vorto *negro*

troviĝas, sed en la verda eldono la vorto tute malaperis. Ĝi ne estas anstataŭita de alia vorto. En la sveda oni povas diri *färgad* –



kolorigita, sed ĉi tiu vorto ne funkcias esperante. Kial do la vorto *nigrulo* ne troviĝas en *Lilla esperanto-ordboken* de 2017? Oni povas uzi la vorton *afrikano* sed *nigruloj* troviĝas ne nur en Afriko.

Do, kara legantaro – kiel ni solvu la vortproblemon????? /Siv

## Trezora ĉaso en la arta muzeo

Vendrede la 13 an de februaro kelkaj membroj en la Ora Klubo vizitis la artan muzeon de Göteborg. Estas ĉiam tre interese viziti tiun tre vidindan muzeon kaj mi certe ne volis maltrafi tiun okazon.

Post kolektiĝo ĉe la enirejo kie Ingegerd Granat disdonis paperojn pri kvizo kun demandoj pri pentristoj, ni decidis komenci nian vagadon en la plej supra etaĝo. Tie troviĝas la bela galerio Furstenberg, kie oni povas rigardi kaj admiri multajn grandajn belajn pentraĵojn. Unu el la plej belaj laŭ mia opinio estas "Nordía somervespero" de Richard Bergh, pentrita



ĉirkaŭ 1900. Multaj aliaj pentraĵoj en la galerio estas de Carl Larsson.

Ni daŭrigis al la pli malsupraj etaĝoj, kiuj ankaŭ estas ege vidindaj. La muzeo havas ec unu pentraĵon de Rembrandt "La kavaliro kaj la falko".

Post unu, du horoj de marŝado tra diversaj ĉambroj oni estas iom laca en la kruoj kaj ni decidis fini la viziton tiufoje.

Por vidi ĉion interesan oni devas reveni multfoje.

Ĝuste nun la muzeo havas ankaŭ specialan ekspozicion pri pola pentrado komence de la 20a jarcento. Ĝi daŭros ĝis la 17 marto 2019.

/Ralf Jalming



# Skattjakt på Konstmuseet i Göteborg

Hitta Skatterna:




*Carl Kylberg. "Hemkomsten".*



*Ole Kruse "Livets Träd".*



*Olle Olsson Hagalund "Hötorgsmålarens atelje".*





*Richard Bergh "Nordisk Sommarkväll".*



*P S Kröyer "Hipp hipp hurra konstnärsfest på Skagen".*

*Ivar Arosenius "Flickan och ljuset".*





*Konstmuseet i Göteborg med Poseidon i förgrunden.*

*Ernst Josephsson "Näcken".*

## Krea skribado – laborejo

De Monica Eissing

Post la vizito en la Artmuzeo 2019 02 13 mi iris al la urba biblioteko.

Mi aŭdis la prelegon pri krea skribado de skribinstruistino Agneta Slonawski.

Ŝi parolis pri krea skribado. Oni ekzercis skribi per skribilo sur la papero dum kelkaj minutoj sen pensi pri kio oni skribis. Oni uzas fluadan skribadon por veni preter atingajoj kaj trompi la internan kritikiston.

Se oni fiksiĝus – ne reskribu ĝin, daŭrigu nur.

Skribtempo dum kvin minutoj.

Oni havu ritarojn – la tempon, la lokon, promenadon/movadon. Tiuj estas gravaj. Oni ankaŭ havu ilojn – bonan skribilon kaj notkajeron.

Ne atendu la inspiron! La inspiro tamen estas: Muziko, Movo, Literaturo, aŭskulti sonlibrojn kaj subaŭskulti.

Ni ankaŭ skribis kelkajn skribekzercojn. Mi pensis, por mi estas malfacile skribi sub premado. Ili havis aŭdhelpilojn, tre bone por mi. Mi ja estas aŭdhandikapito.





# Letero de Lucyna el Gdansko

Saluton Siv,


Jen estas novaĵoj de Gdansko. Hieraŭ vizitis nin Sten, kaj li estis kvar horojn ĉi tie. Mi kun Elvira promenis kun li tra la urbo por montri al li kiel ŝanĝiĝis nia urbo post la tempo de lia pasinta vizito ĉe ni.



Jen kelkaj fotoj de lia vizito. Estas foto de la sukkena ĉefaltaro kiu staras en preĝejo de Sankta Brigida en malnova parto de nia urbo.

Mi kore salutas vin,

Lucyna



## Familiaj nomoj en Pollando, Litovio, Islando kaj Svedio

Dum la esperanta renkontiĝo "Esperanto sur la strando 2018" en Pollando mi rimarkis kelkajn interesajn konstruojn por familiaj nomoj en Pollando kaj Litovio. Tial mi komencis korespondi kun kelkaj de la partoprenantoj kaj ricevis multe da interesaj klerigoj. (Dankon al Elwira, Paulina kaj Vida!)

La manieroj por doni kaj uzi familiajn nomojn povas varii multe inter diversaj nacioj, tial mi komencas je eta vortaro (*kiu nur validas en tiu ĉi artikolo*):

*antaŭnomo*, individua nomo kiu oni ricevis je naskiĝo, ekzemple "Martin";



*postnomo*, nomo kiu kompletigas la antaŭnomo iamaniere, ekzemple per rilato aŭ kvalito. La postnomo ofte konsistas el la familia nomo; *familia nomo*, nomo kiu estas komuna al la plej proksima parenkaro; *parenca nomo*, nomo kiu estas komuna al multaj parencoj.

### Postnomoj en Pollando kaj Litovio

- *filo* plej ofte ricevas la *postnomon* de sia patro
- *filino* ricevas la *postnomon* de sia patro, ofte kun ina finaĵo

- *edzino* ofte ricevas la *postnomon* de sia edzo, ofte kun ina finaĵo

### Inaj finaĵoj en Pollando

Se temas pri tipe polaj nomoj kun finaĵo "ski" aŭ "cki", ili havas inan formon "ska" aŭ "cka".

Se la vira nomo havas la finaĵon "y", la ina formo estas "a".

Ceteraj *postnomoj* estas la samaj por edzoj kaj edzinoj.

### Nomŝanĝo tradicia en Pollando

Estas tradicio ke virino ŝanĝas la nomon kiam ŝi edziniĝas, sed tio ne estas devo. Laŭ leĝo oni povas mem decidi. Virino povas ŝanĝi la nomon, povas reteni la propran, povas preni la duan nomon aŭ ankaŭ la viro povas preni la nomon de virino. Ankaŭ oni povas decidi ĉu infanoj havos la *postnomon* de patro aŭ de patrino.

### Inaj finaĵoj por edziniĝintaj virinoj en Litovio

Post geedziĝo multaj litovaj virinoj ŝanĝas *postnomon* al la edza. Laŭ antikva kutimo estas aldonata finaĵo "ienė". Virino rajtas resti ankaŭ je sia *postnomo*, aŭ al sia denaska *postnomo* aldoni duan (edzan) *postnomon* kun finaĵo "ienė".

Laŭ nunaj leĝoj, ĉiu virino rajtas ŝanĝi sian *postnomon* al pli mallonga: depreni finaĵon de patra aŭ edza *postnomo* kaj aldoni "ė". Ekzemple, Sakalas – Sakalė (por edzino kaj filino).

### Inaj finaĵoj por filinoj en Litovio

Se patra nomo finiĝas per "is", "ys", "ė", "ia", filina nomo finiĝos per "ytė".

Se patra nomo finiĝas per "as", "a", filina nomo finiĝos per "aitė".

Se patra nomo finiĝas per "us", filina nomo finiĝos per "utė".

### Kutima postnoma finaĵo en Pollando

La finaĵo "ski" ne signifas "filo" sed estas nobela, ĝis 15-a jarcento oni aldonis "ski" al nomoj de lokoj kaj tiamaniere faris *postnomon*. En 16-a kaj 17-a jarcentoj oni aldonis "ski" ankaŭ al aliaj vortoj kaj tiamaniere faris nobelajn *postnomojn*.

La finaĵoj "wicz" venis al Pollando de Belarusio.



### En Nordio

Antaŭ mil jaroj, ĉiu infano plej ofte nur havis sian *antaŭnomon*. Estis sufiĉe en eta rondo, sed kiam oni komencis renkonti pli multajn homojn oni bezonis kompletigaĵon. Tiam oni prenis la *antaŭnomon* de patro kaj aldonis finaĵon "son" (filo) aŭ "dotter" (filino). Oni tiel havis kaj *antaŭnomon* kaj *postnomon*. Tiu *postnomo* la virinoj tiam retenis ankaŭ post geedziĝo.

En la nobelaro en Svedio oni komencis uzi nobelajn *parencajn nomojn* jam en la mezepoko, sed oni ankaŭ retenis sian malnovan *postnomon*, ekzemple "Gustav Eriksson Vasa" (Gustav, filo de Erik de nobela domo Vasa). Kiu post grandaj heroaĵoj (plej ofte milita) nobeliĝis, povis ricevi "von" aŭ



"af" (en esperanto: el) antaŭ sia *parenca nomo*, preskaŭ kiel oni en Pollando aldonis la finaĵo "ski".

Burĝoj en Svedio komencis uzi *parencajn nomojn* en 17-a jarcento kaj ŝanĝis siajn malnovajn nomojn kun finaĵoj "filo" kaj "filino" kontraŭ novaj *parencaj nomoj* kiuj tiam ofte enhavis vortojn por objektoj en la naturo, ekzemple "arbaro", "monto", "valo", "torento", "fluo" kaj tiel plu.

Inter la kamparanoj oni retenis la malnovan nomregulon kun "filo" kaj "filino" ĝis 1870 kiam oni decidis konstantigi la nomoj kiujn oni havis ĉe tiu okazo, sed oni ŝanĝis ĉiujn "filino" al "filo". En kelkaj familioj oni tamen retenis la malnovan nomregulon longe en la 20 jarcento. Fakte, mi konas familion, kiu eĉ hodiaŭ uzas la malnovan nomregulon: Anders Eriksson, filo de Erik Andersson kiu estas filo de Anders Eriksson kaj tiel plu.

Nuntempe neniu plu reagis al la malnova nomregulo, sed certe estas komike ke virino povas esti nomita al ekzemple Lena Arvidsson, kiu signifas "Lena, *filo* de Arvid"!

### En Islando

Oni daŭre uzas la originan nordian regulon, kiu signifas ke ĉiu familio povas havi kvar diferencajn *postnomojn*, nur infanoj de sama sekso povas havi saman *postnomon*.

*Parencaj nomoj* estis uzitaj kelkajn fojojn pli frue sed estas nun preskaŭ malaperintaj.

En Islando oni nomiĝas nur la *antaŭnomo*, ekzemple Eidur Gudjohnsen nomiĝas nur Eidur, sed li estas filo de Gudjohn.

En telefonlibroj ĉiuj homoj estas vicigitaj laŭ la *antaŭnomoj*.

/Lasse Granat

## Jan Hellström fotis malsekterenojn en Hökälla, Gotenburgo

En februaro unue neĝegis, poste iomete degelis okazante glitigajn vojojn kaj poste pluvegis. Nun estas akvo sur la stratoj, la

herbejoj, la ĝardenoj, en la keloj... jes ĉie! Tamen bone ke la malsekterenoj havas pli da akvo ol la pasintan sekan someron.



La Hökälla lageto apud la digo.



*Utängen rigardata de la promenonto trans Kvillebäcken.*



*Denove: La digo ĉe la Hökälla-lageto.*



*La promenvojeto de la Hökälla-lageto ĝis la parko de Lillhagen.*





*Panoramo de la vojo de Lillhagen trans Utängen kaj la rivero de Kville en la direkto de Kvarnkullen.*

## La Serpentario



*La Serpentario nomiĝas ankaŭ la Sekretaribirdo.*

*Nun en la tempo de jarkunvenoj mi volas prezenti apartan birdon, nome la "Sekreterarfågeln" en la sveda lingvo kaj Serpentario en esperanto.*

*Tiu birdo ofte havas similecon al la ideala sekretario en niaj estraroj.*

*Legu kaj ĝuu!*

**La serpentario** (*Sagittarius serpentarius*) estas rabobirdo. Estas rimarkinde ke la birdo ordinare iras per siaj altaj kruroj sur la grundo, anstataŭ flugi.

La manĝokarto de serpentario certe ne estas laŭ mia gusto. La birdo manĝas serpentojn, lacertojn, malgrandajn mambestojn kaj insektojn, kiujn la serpentario atingas kurante kaj mortigas kaj batas per la piedoj.

La serpentario troviĝas en Afriko sur la granda savano, ĝi ĉasas sur la grundo la tutan tempon malgraŭ ke la birdo kapablas flugi.



La birdo ne hezitas ataki danĝerajn kaj malamikajn bestojn. Eĉ ne venenajn serpentojn kiel kobrojn.

Granda nombro de serpentarioj malaperis post la jaro 1990 kaj nun ili estas kategoriitaj "vundeblaj birdoj".

*Kion la jarkunvenantoj lernas per studoj pri la serpentario? Certe oni ne permesas al la*

*sekretario bati siajn kontraŭopiniantojn. Ankaŭ ne inciti iun kaj ne ĉikanadi iun.*

*Bonajn jarkunvenojn al ĉiuj!*

Ne faru kiel la serpentario... argumentoj estas ĉiam pli bonaj!

/Ingegerd



## Verda flago pli ol lingva klubo

Artikolo de Arlain Mayinda, Kongo Kinŝasa, [verdaflagoklubo@gmail.com](mailto:verdaflagoklubo@gmail.com)

La klubo *Verda Flago* estas klubo de esperantistoj el la urbo Mbanza Ngungu en la provinco Kongo Central.

Fakte la lingvo Esperanto eniris Rdkongon en la sesdekaj jaroj, la unua esperantisto nomiĝas Ngangu Bakidila Ndontoni. Tiu lasta loĝis en Lukala je sesdeko da kilometroj de Mbanza Ngungu. Kun la kresko de la tempo, precize en 1987 kiam la esperanto-komunumo celebris la centjariĝon de la universala lingvo, kreiĝis Verda flago-klubo.



Iu lukalano, nome Niansi Nkunku, instruis esperanton por la unua fojo en Mbanza Ngungu. La tiamaj lernantoj estis preskaŭ ĉiuj gimnazianoj. Ili kun tre granda fervoro kaj entuziasmo lernis la lingvon de Zamenhof.

Multaj el la plej agemaj kaj fervoraj propagandistoj de Esperanto en Rdkongo devenas de Verda Flago. Unu el tiuj agemaj membroj de Verda Fago, nome Ntoto Zola,

Du foje semajne kaj laŭbezone la membroj de Verda flago laboras en la kluba kampo. Kaj ĉiusabate la klubo kunvenas por semajna kunveno. Tiuj kunvenoj plifirmigas la ligan inter la membroj de la klubo.

Notindas ke la lasta sabato de ĉiu monato la klubo organizas konversacian rondon. Tiaj renkontiĝoj multe helpas kadre de la tiel nomata utiligo de la lingvo. Dum tiuj



estis kunordiganto de la afrika komisiono de UEA, kaj iu alia Arlain Kizeyidioko estas sekretario de la nuna afrika komisiono de UEA.

Maturiĝinte en lando, kies laborpostenoj estas tikla problemo, kaj por vivtenigi siajn familianojn kelkaj membroj de Verda flago ariĝis en iu fakgrupo Agroturisma Esperantista Rondo AER.

AER kreiĝis kun la iniciato de Itala samideano Mello Ermano. Tiu lasta vizitis Mbanza Ngungu-on turismokadre, konstatinte, ke preskaŭ ĉiuj membroj de la klubo kulturis la teron.

La akvopurigiloj oni aĉetadis unu post la alia kaj sinsekve dum unu jaro kaj duono. Same okazis por la elektraj sunpaneloj.

Nuntempe ekde la 5a de la kuranta monato ekis alian projekton, kies titolo estas "Fridujo por ĉiu familio de esperantisto".

renkontiĝoj okazas foje, ke iu el la membroj prelegetas pri iu temo komune elektita ĉu pri lingvistiko, ĉu pri kulturo k.t.p. Tiuokaze ĉiuj partoprenas la debaton kaj tiamaniere ĉiu profitas la okazon plibonigi sian lingvoscion.

La ĉefaj aktivecoj de la klubo Verda Flago estas la propagando kaj la kursoj de Esperanto. Ĉiujare okazas du porkomencantaj kursoj kaj unu progresiga kurso. Nuntempe la klubo havas centoj da libroj donaco de danaj samideanoj. La biblioteko provizore estas ĉe la sekretario.

Mbanza Ngungu situas en la plej sekura regiono de Rdkongo, la urbo havas preskaŭ 100.000 loĝantojn. Li konsilis al ili kunigi siajn fortojn kaj havi komunan kampon kies rikolto donu profiton al ĉiuj.

Reveninte hejmen en Italio, li sendadis semojn laŭpove kaj esperantaĵojn por la starigo de la kluba biblioteko.

Post multajara apogo ĝis la fino de la naŭdekaj jaroj Agroturisma malfondiĝis kune kun Verda Flago. Preskaŭ ĉiuj el ties agemaj membroj translokiĝis, kelkiuj iris eksterlande (Angolo), kaj aliaj en la ĉefurbo Kinŝaso.

En 2015 la sociekonomia situacio de Angolo malboniĝis, multaj konganoj kiuj tie enmigrigis revenis hejmen mi mem kaj aliaj samideanoj faris la samon.

Reveninte hejmen, ni denove decidis revivigi unue Verda Flago, kaj poste AER.

Kun la helpo de eksterlandaj amikoj kies anonimecon ni respektas (laŭ ilia deziro), la membroj de verda flago entute 16 familioj akiris hejmajn akvopurigilojn kadre de mikrokredito. Ĉar mankis trinkebla akvo al la komunumo iu el la anonima samideano el Danlando proponis la aĉeton de akvopurigiloj por esperantistaj familioj kadre de la ĵus menciita mikrokredito.

Ĉar la elektro estas ankaŭ alia tikla problemo, la alia amiko el Germanujo iniciatis alian mikrokrediton kiu ĉifoje temis pri elektraj sunpaneloj por 16 familioj de esperantistoj membroj de Verda Flago.

Ĉiuj membroj vivtenas el agrikulturo kaj bredado, la rikoltaĵoj de tiuj aktivecoj faciligis la akiron de la menciitaj aĵoj. (membro de Verda Flago).

Letero de Arlain:

Hodiaŭ (24/1) la nova prezidanto ekokupas sian postenon kiel ŝtatestro. La popolo elektis alian personon, sed la elekta komisiono alie decidis. Ni atendas multon de la nova prezidanto, precipe la pacon kaj bonan klimataferon por ke eksterlandaj aferistoj investu en sekureco en nia lando. Ne la tuta lando malsanas nur en la orienta parto (riĉa je multaj riĉaĵoj) regas milito.

En la okcidenta parto de la lando ni pace vivas.

La urbo havas bonan reputacion, ĝi havas du el la plej prestiĝaj universitatoj de la lando, ĝia popolo estas gastema kaj paca.

La klimato estas milda, dum la pluva sezono sunas kaj tiam la temperaturo alproksimiĝas je 35 gradoj dum la tago. Malgraŭ tio, milde ventas nokte. Dum la seka sezono kiam someras okcidente ĉi tie la suno maloftas kaj la vetero estas milda.

Je kelkaj kilometroj de la urbo estas du grotoj, unu kiuj havas ĉiu sian partikularecon. La plej granda groto havas blindaj fiŝoj neniam troveblaj aliloke. Ĝi estis malkovrita de iu belgo dum la kolonia epoko. La dua havas iaspecajn maloftajn vespertojn.

Je 30 km de Mbanza Ngungu estas botanika ĝardeno kun kelkaj mirindaj plantoj. Iuj estas pli ol centjaraĝaj. Tiu aspekto de la afero instigis al nia itala amiko pensi pri organizado de turismaj aktivecoj. Sed nuntempe pro la nesekura situacio de nia lando ni ne aŭdacas organizi internaciskalan turisman aktivecon.

La neesperantistoj, kiuj de proksime sekvas la evoluon de Verda flago, opinias ke Esperanto estas religio aŭ io simila.

La klubo Verda flago estas ĉiam malferma al ĉiu kunlaborema homo, kiu celas la antaŭenigon de la lingvo Esperanto kaj ties komunumo.

KIZEYIDIOKO MAYINDA ARLAIN



*Sur la foto estas cepokulturo. Ni kutime kulturadas tomatojn, brasikojn, karotojn, poreojn, melongenojn, pizojn, kapsikojn kaj spinacon. Mi finas mian leteron dezirante al vi ĉion bonan! /Arlain*



# Informo pri Esperanto-instruado en Karlskoga Popola Altlernejo

Esperante kaj svede de Lars Forsman

Mi instruantis la anglan kaj germanan en la Popola altlernejo de Karlskoga. Iun tagon venis doktorino Zofia Fornalova el Pollando por informi pri la Internacia lingvo de Esperanto kaj nia lernejestro preskaŭ devigis min viziti la prelegon – *Esperanto estas bona por ĉia lingvotrejnado*, li diris.

Mi estis mirigita pro la fakto ke mi komprenis relative multe pri la parolado kaj post la leciono mi kontaktiĝis kun la interpretantino, Kerstin Rohdin, dirante ke mi iam poste volus lerni la lingvon, sed ankoraŭ ne.

Ŝi tamen tuj volis kapti min, invitante min al kursoj kaj tre obstine telefonis min multajn fojojn. Finfine mi rezignis, kaj eklegis unu el ŝiaj logaĵoj, vere interesiĝis kaj iom post iom ekkomprenis la eblecojn de la lingvo. Mi eĉ komencis elpensi propran lernolibron, ĉar mi dum multaj jaroj verkis etajn lernilojn en la angla kaj germana lingvoj. Mia lernolibro por komencantoj ricevis la titolon *Egaleco kaj Paco per Esperanto*. Ĝi estis tradukita en la finnan, ĉinan, rusan, anglan kaj danan.

Do, mi tage intense instruis la anglan, germanan, francan en la lernejo, vespere mi korektis testojn kaj nokte preparis mian novan lernolibron. Mia kapo estis plenplena je lingvoj kaj iun vesperon mia edzino plimalpli ŝerce diris: "Vespere kaj nokte vi prilaboras vian Esperantan libron. Sed en nia dormejo mi nepre ne volas aŭskulti viajn



Jag undervisade i engelska och tyska på Karlskoga folkhögskola. En dag kom en doktor Zofia Fornalova från Polen för att informera om det internationella språket Esperanto och vår rektor nästan tvingade mig besöka föreläsningen – *Esperanto är bra för all slags språkträning*, sa han.

Jag förvånades av det faktum att jag förstod relativt mycket av talet och efter lektionen tog jag kontakt med tolken, Kerstin Rohdin, och sa att jag skulle vilja lära mig språket något senare, men ännu inte. Hon ville likväl genast få tag i mig i

det att hon inbjöd mig till kurser och mycket envist ringde mig många gånger. Till slut gav jag upp och började läsa ett av hennes lockbeten, blev verkligen intresserad och började s. s. förstå möjligheterna i språket. Jag tänkte t.o.m ut en egen lärobok, för under många år hade jag författat små läroböcker i engelska och tyska. Min lärobok för nybörjare fick titeln *Jämlikhet och Fred med Esperanto*. Den översattes till finska, kinesiska, ryska, engelska, danska.

Så undervisade jag på dagarna engelska, tyska, franska i skolan, på kvällarna rättade jag tester och på natten förberedde jag min nya lärobok. Mitt huvud var verkligen fullt av språk och en kväll sa min hustru mer eller mindre skämtsamt: "Kväll och natt förbereder du din esperantobok. Men i vårt sovrum vill jag absolut inte lyssna till dina

Esperantajn prelegojn kiam vi duondormas!" Alian fojon mi sidis kun studantoj en la klasĉambro kaj ni kune legis anglan tekston. Poste mi demandis: "Would you like to say a few words about the text", kaj mi montris al Kaj, dana lernanto, dirante: "kaj vi ne devas diri multe da frazoj!" La lernantoj malfermis siajn buŝojn kaj aspektis kiel bird-nestokestoj: "Was that English? Or did you speak a secret language?"

Nun statas tiel ke la vorto "kaj" Esperante signifas *and*. Evidente mi mem ne notis mian lingvosaltadon. El tio rezultis, ke miaj kursanoj volis provi Esperanton la lastajn kvin minutojn de ĉiuj lecionoj.

Mi kontaktiĝis kun la lernejestro, dirante ke miaj gelernantoj montras grandan intereson pri Esperanto. Li proponis, ke ni diskutu oksemajnan kurson en Esperanto dum onta instruista kolegio. Sed dum la kunveno miaj kolegoj montris klaran malintereson kaj reziston. Tamen antaŭ la voĉdonado la rektoro volis diri kelkajn vortojn: "En mia junaĝo ni estis kelkaj pastraj aspirantoj kiuj lernis Esperanton ĉe la fama Anna Alamo Sandgren. Post unujara kurso ni kune vizitis Mondan Esperantokongreson en Germanio kun miloj da partoprenantoj. Ĉiuj parolis Esperanton kaj la internacia etoso estis mirinda. Tiajn studantojn mi deziras en nia lernejo." Neniu volis kontraŭdiri la vortojn de la rektoro kaj mi rajtis inviti al oksemajna kurso al la lernejo, kondiĉe ke mi povos logi 15 studantojn al studado. Mi freneze eklaboris, enmetis anoncojn en gazetoj, skribis al kluboj, kontaktis eksstudantojn kaj vizitis gimnaziajn klasojn. Kaj en januaro 1988 mi havis la interkonsentitan nombron da partoprenantoj. Kia feliĉo!

En mirinda nokta revo iu diris al mi: "Instruu Esperante! Certe venos studantoj el multe da landoj kaj ili ne komprenos la svedan aŭ anglan kiel helplingvon." Tio estis saĝa mesaĝo kaj mi ekuzis malnovajn instrumetodojn, kajeretojn de miaj someraj

Esperantoföreläsningar när du halvsover!" En annan gång satt jag med elever i klassrummet och vi läste tillsammans en engelsk text. Sedan frågade jag: "Skulle ni vilja säga några ord om texten och jag pekade på Kaj en dansk elev och sa på Esperanto: "Kaj du behöver inte säga många fraser!" Eleverna gapade och såg ut som fågelholkar: "Var det engelska eller talade du ett hemligt språk?"

Nu förhåller det sig så att ordet "kaj" på Esperanto betyder "och". Tydligt förstod jag inte själv mitt språkhopp. Av detta blev resultatet, att mina kursare ville prova på Esperanto de sista fem minuterna av alla lektioner.

Jag tog kontakt med rektorn och informerade om att mina elever visar ett stort intresse för Esperanto. Han föreslog, att ni skulle diskutera en åttaveckorskurs i Esperanto under nästa lärarråd. Men under mötet visade mina kolegor klart ointresse och motstånd. Men före omröstningen önskade rektorn framföra några ord: "I min ungdom var vi några pastorskandidater, som undervisades i Esperanto hos den kända Anna Alamo Sandgren. Efter en ettårig kurs besökte vi tillsammans en Esperanto-världskongress i Tyskland med tusentals människor. Alla pratade Esperanto och den internationella stämningen var fantastisk. Sådana elever önskar jag i vår skola." Ingen ville motsäga sig rektors ord och jag fick rätten att inbjuda till en åttaveckorskurs till skolan, under förutsättning att jag kunde locka 15 elever till studier. Frenetiskt införde jag tidningsannonser, skrev till klubbar, kontaktade f. d. elever och besökte gymnasieklasser. Och i januari 1988 hade jag överenskommet antal deltagare. Vilken lycka!

I en underbar dröm sa någon till mig: "Undervisa på Esperanto! Säkert kommer elever från många länderoch de förstår inte svenska eller engelska som hjälpspråk. Detta

kaj eksterlandaj kursoj kaj elpensis proprajn metodikojn. Mi montris per miaj fingroj kiel kalkuli, desegno sur la nigra tabulo, petis ilin ripeti vortojn aŭ frazojn kaj ĉiun matenon bonvenigis ilin per malkorektaĵoj surtabule. Neniu volis malfruiĝi al la unua leciono kiam ili kune korektis la skribitaĵon. Dum paŭzoj ni ofte sidis en la lerneja kafejo kaj parolis Esperante, ĉiusemajne uzante pli kaj pli da vortoj. Aliaj studantoj ofte demandis kiom da semestroj vi jam studas la lingvon? La respondo povus esti kelkajn semajnojn. Estis mirinde instrui en grupo, kie oni tiel rapide lernas. Post ses, sep semajnoj mi observis etan malkvieton en la studgrupo kaj iu sinjorino post leciono venis al mi kaj diris: "Neniu volas hejmeniri post 8 semajnoj, ili ege ŝatas la instruadon kaj volas resti la tutan semestron!" Mi tuj iris al la lernejestro. Li kontentiĝis kaj petis al la estraro plilongigi la kurson. Nun pli kaj pli da eksterlandanoj aliĝis al la tutsemestra edukado. Entute venis partoprenantoj el 39 nacioj dum 15 jaroj. Multaj el ili nun instruas Esperanton diverslande.

Interrete en mia hejmpaĝo [www.larsforsman.se](http://www.larsforsman.se) vi povas legi recenzojn kaj rigardi kiel aspektas miaj libroj. Se vi volas demandi min pri la 15 libroj kiujn mi verkis bonvolu kontakti min telefone 070-675 7889 aŭ per e-poŝto [larsespo@yahoo.se](mailto:larsespo@yahoo.se).

Por ke la studantoj havu malmultekostajn librojn mi mem skribis kaj ofte presis ilin. Ankoraŭ kuŝas multe da libroj en grandaj kestoj kaj estas por vendo. Mi antaŭe diris ke la partoprenantoj rapide lernis ĉar ili loĝis en komunaj loĝejoj kaj komencis frue uzi Esperanton kiel memklara lingvo. Mi memoras ke brila ĉino jam post trimonata studado venis kun mi al internacia Esperantokongreso por fervojistoj en Danio kaj faris prelegon pri la edukado en Karlskoga kaj ricevis aplaŭdadon kaj ricevis multe da demandoj. Alvenante al la doganejo en Helsingborgo du doganistoj haltigis nin kaj

var ett klokt budskap och jag började använda gamla lärometoder, häften från mina sommar och utlandskurser tänkte ut egna metoder. Jag visade med mina fingrar hur man räknar, tecknade på svarta tavlan, bad dem härm ord eller fraser och välkomnade dem varje morgon med felaktigheter på tavlan. Ingen ville komma sent till första lektionen när de tillsammans rättade det skrivna. I pauser satt ni ofta i skolkaféet och pratade Esperanto, och använde för varje vecka fler och fler ord. Andra elever frågade ofta hur många terminer har ni redan pratat språket? Svaret kunde bli några veckor. Det var underbart att undervisa, där man så snabbt lär sig. Efter sex, sju veckor noterade jag en viss oro i klassen och en kvinna i studiegruppen kom till mig efter lektionen och sa: "Ingen vill åka hem efter 8 veckor, de tycker verkligen om undervisningen och vill stanna hela terminen." Jag gick genast till rektor. Han blev nöjd och bad styrelsen förlänga kursen. Nu anmälde sig alltfler utlänningar till helterminkursen. I allt kom deltagare från 39 nationer under 15 år. Många av dem undervisar nu Esperanto i olika länder.

På Internet på min hemsida [www.larsforsman.se](http://www.larsforsman.se) kan ni läsa recensioner och se hur mina böcker ser ut. Om ni vill fråga mig om de femton böcker som jag författat fråga mig gärna på telefon 070-675 7889 eller per e-post [larsespo@yahoo.se](mailto:larsespo@yahoo.se)

För att de studerande skulle få billiga läromedel skrev jag själv och tryckte dem oftast själv. Ännu ligger många böcker i stora lådoroch är till salu. Jag sa tidigare att deltagarna snabbt lärde sig språket för de bodde i gemensamma boenden och började tidigt använda Esperanto som självklart språk. Jag kommer ihåg att en duktig kines redan efter tremånaders kurs kom med mig till en internationell Esperantokurs för järnvägare i Danmark och föreläste om utbildningen i Karlskoga och fick applåder



unu volis kontroli la kofron de la aŭto kaj la alia ekdemandis nin krudvoĉe pri nia aferoj en Danio. Ni rakontis ke ni intencis viziti Esperantan mondkongreson kaj la doganisto petis nin paroli Esperanton. Mi kaj la ĉino vigle ekparolis kaj post minuto la doganisto ĝoje kaj kontente diris: "Karaj amikoj, mi tute komprenas la mirindan lingvon. Post la dua mondmilito Esperanto estis la turista, polica kaj dogana lingvo en multaj landoj. Bedaŭrinde la politikistoj ne komprenis la valoron de tiu lingvo. La tempo tiam ne estis matura. Sed certe iam estos!"

Alia ĉino vere ŝatis Esperanton kaj eĉ komprenis la svedan iomete dank al svedaj amikoj en la lernejo. Li kontaktis siajn labordonantojn en sia hejmlando kaj ili donis la rajton al la ĉino ankaŭ resti por studi la svedan ontan jaron. Post la julferiojn li revenis al la sveda kurso kaj post tri semajnoj mi renkontis lin en la lerneja biblioteko kaj demandis lin ĉu vi nun povas paroli iom da sveda. Li respondis jam en la sveda: "Nu kan jag också prata svenska, det är jättekul!" Do, mi invitis ĵurnalistojn de gazetoj kaj radio por intervjui lin svede. Ili surpriziĝis ke li kaj povis kompreni la demandojn kaj respondi svede. Post la sukcesa intervjuo venis vermlanda fotisto kaj demandis al mi en vermlanda dialekto: "Taler du ofta me han på det däringa språke?" Tuj poste venis la ĉino al mi kaj demandis: "Man säger väl talar med honom?" Mi mem iĝis surprizita post tiom da mallonga studado sed mi scias ke oni lernas novan lingvon pli rapide post studado de Esperanto. Bedaŭrinde multaj lingvistoj ne volas kredi je tio, se ili neniam ekstudis la Internacian lingvon. Sed verŝajne Esperanto en la futuro iĝos prototipo por lingvoj.

*Lars Forsman*  
070-675 7889  
larsespo@yahoo.se  
www.larsforsman.se



och många frågor. När vi kom till tullen i Helsingborg så stoppade oss två tullare och en ville kontrollera bakluckan på bilen och den andre frågade oss skarpt om våra affärer i Danmark. Vi berättade att vi ville besöka en Esperanto världskongresskongress och tullaren bad oss tala Esperanto. Jag och kinesen började glatt tala och efter någon minut sa tullaren glatt och nöjt: "Kära vänner, jag förstår helt det fantastiska språket. Efter andra världskriget var Esperanto turist, polis och tallspråket i många länder. Tyvärr förstod inte politikerna värdet av detta språk. Tiden var då inte mogen.

En annan kines gillade verkligen Esperanto och förstod lite svenska tack vare svenska vänner i skolan. Han kontaktade sina arbetsgivare i sitt hemland och de gav kinesen tillstånd att också blir kvar för att studera svenska kommande år. Efter julferierna återkom han till den svenska kursen och efter 3 veckor mötte jag honom i skolans bibliotek och jag frågade honom om han nu kan prata lite svenska. Han svarade redan på svenska: "Nu kan jag också prata lite svenska, det är jättekul." Och då inbjöd jag journalister på tidningar och radio för att intrvua honom på svenska. De blev förvånade att han kunde förstå frågorna och svara på svenska. Efter intervju frågade mig någon på värmländska: "Taler du me han på de däringa språke? Genast på kom kinesen till mig och frågade: "Man säger väl talar med honom?" Jag blev själv förvånad efter en så kort studietid, men jag vet att man lär sig ett nytt språk snabbare efter studier av Esperanto. Tyvärr vill inte många språkmän tro på detta, om de aldrig

börjat studera det Internationella språket. Men troligen blir Esperanto i framtiden en prototyp för språk.

*Lars Forsman*

# Du popularaj TV-programoj

**Pri la Melodifestivalo:** La sveda televido sendas kelkajn programojn, kun konkursaj kontribuoj. Telefone la spektantoj elektas la plej bonajn, kiuj poste denove konkursos, ĝis fine estas nur unu kontribuo, kiu meritas partopreni en la fina Melodifestivalo en Tel



Avivo. La 16an de februaro la konkurso okazis en Leksand, Dalekarlio. Unu el la gajnintoj estis la sameo Jon Henrik Fjellgren kun la melodio "Norrskén", boreala aŭroro. Mi vere esperas ke li estu la fina gajnonto!!!! /Siv



**Pri La Antikva rondo.** La pasintan someron la Sveda Televido daŭrigis la popularan serion



*Homoj venas por havi siajn antikvajn trezorojn taksitaj.*



*Spertuloj taksas la antikvaĵojn. Kelkfoje la posedanto estas elrevigita, kelkfoje mirigita. Ĉiam estas interesaj rakontoj pri la deveno de la antikvaĵoj.*

Antikrundan – ĉe la kastelo Nääs proksime al Gotenburgo.



*En malnovaj tempoj: Ĉe la kastelo Nääs la fama verkistino Selma Lagerlöf renkontis sian amikino Sofie Elkan.*



*Inter la antikvaĵoj troviĝis bankostumo por viroj. Ĉe Nääs estas rivero kaj lago kaj komence de la dua jarcento oni alte taksis sanigajn banojn.*

## Klassisk morgon i P2 – Med esperanto som modersmål

Fredag 22 februari 2019, från Sveriges Radios hemsida:



– Mi parolas esperanton, säger Ellen Åberg som är uppvuxen med esperanto som sitt modersmål. Hennes mamma och pappa träffades tack vare det internationella språket.

För programledare Pernilla Eskilsson berättar Ellen att hennes mamma från Prag och hennes pappa från Skövde hade språket esperanto gemensamt när de träffades på 60-talet. Även hennes morföräldrar var aktiva esperantister.

– Man är en internationalist, man vill mötas över gränserna utan att vara bunden vid ett speciellt språk som är bundet till en viss region eller en viss kultur. Alla ska kunna prata med varandra, säger Ellen.

Ellens esperanto är inte så aktiv numera, men under de första åren av hennes uppväxt var det esperanton som gällde. Det var först i treårsåldern som svenskan tog över.

– Jag kanske var i fyra-femårsåldern när jag förstod att det är inte alla som kan byta till

esperanto när de tycker att det fungerar bättre, säger Ellen.

Esperanto skapades på slutet av 1800-talet och ordet esperanto betyder ”en som hoppas”. Ellen tycker att många av orden i språket är bekanta.

– Det är ett indo-europeiskt språk i grunden. Mycket romanskt, även germanskt, så är man europé så känner man sig väldigt hemma, säger hon.

Vad är det bästa med esperanto?

– Det är lite som med musik. Man har något gemensamt, men var och en tolkar, man sätter sin prägel i språket. Men man har samtidigt en enkel bas att utgå ifrån, säger hon.

I ljudklippet kan du höra Marinens musikkår spela Sam Rydbergs Vivu esperanto som han skrev till en esperanto-kongress i Stockholm 1939.



– Den spelar nog varje musikkår runt om i landet någon gång per år. Den är väldigt populär fortfarande, säger Ellen.

Samtalet med Ellen hade sin grund i Klassisk morgons uppmärksammande av den internationella dagen för modersmål.

Lyssnarna hörde av sig och berättade om ett 20-tal olika modersmål.

Lyssna på avsnittet via:

<https://sverigesradio.se/sida/artikel.aspx?programid=4425&artikel=7160937>

## ☆ Jen la Esperanto-programo en 2019 de la franca E-kastelo Greziljono ☆

- 2019-apr-12/16: Ĥora (korusa) renkonto de Interkant' kun Zdravka Bojĉeva
- 2019-apr-12/16: LandArt, Arto kaj Naturo en Greziljono kun Nathalie Dubrulle
- 2019-apr-26/maj-04: 9a PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Przemek Wierzbowski, Christophe Chazarein, Marion Quenut
- 2019-maj-03/04: 9a PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj
- 2019-apr-28/maj-04: 2a Migra-promenada semajno (en Esperanto) kun Olivier Buisson
- 2019-jul-08/18: 3-a Maratona Esperanto-kurso dum 10 tagoj kun Dennis Keefe,...
- 2019-jul-08/18: 5-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)
- 2019-aŭg-06/16: 9-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj
- 2019-aŭg-06/16: 2-a Internacia danco-semajno kaj Esperanto-kursoj
- 2019-okt-26 / nov-03: 8a AŬTUNE la Esperanto-ferioj – kun halovena festo

### Maison Culturelle de l'Espéranto

Adreso: Grésillon, St. Martin d'Arcé,

49150 BAUGÉ-EN-ANJOU, Francio

Retpoŝto: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

Retejo: [www.gresillon.org](http://www.gresillon.org) aŭ nur [gresillon.org](http://gresillon.org)



## Sommardagar i Göteborg

*- prova en intensivkurs i Esperanto*

Plats: Redbergsskolan, hpl Redbergsplatsen. Grupper på tre olika nivåer.

Tid: må 24 – fr. 28 juni 2019 kl. 10–15.

Avgift 100:–/dag = 500:–

Arrangörer: Göteborgs Esperantoförening,

ILEI och Studieförbundet Vuxenskolan.

Förhoppningsvis får vi utländska medhjälpare liksom 2018.

Under våren kommer mer information på Esperantoföreningens hemsida:

[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)

Esperanto-Societo de Gotenburgo

c/o Andreas Nordström

tfn: 0762–654209

e-post: [gbg@esperanto.se](mailto:gbg@esperanto.se)

Frågor? Kontakta Siv Burell 070–721 34 79.



## Memoraj vortoj pri Jarl Hammarberg

*de Mikael Krall, psikologo kaj bona amiko de Jarlo. En Fejsbuko li enmetis la sekvantajn memorvortojn, kiujn mi, Siv, ricevis permeson kopii kaj traduki.*

Karaj geamikoj,

La pasintan vendredon, la 25an de januaro, mia amiko Jarl Hammarberg forpasis. Tio okazis je la 4a matene, kaj lia edzino Kirsten estis kun li tiam.

Jarl estis konata kiel verkisto, poeto kaj artisto.

Krome Jarl estis vegano, pacifisto (tute rezistis fari la militservon), esperantisto kaj interesiĝis pri la dana verkisto kaj mistikisto, Martinus.


Mi pensas ke la plejparto de tiuj, kiuj konis Jarl nomis lin Jarlo, kiu estis lia esperantonomo. Kiam li skribis poezion esperante, li nomis sin Jarlo Martel-Monto.

Jarlo naskiĝis en Gotenburgo, la 22an de novembro, en 1940. La patro estis la orgenfaristo Nils Hammarberg (1913–1991) kaj la patrino Daga Hammarberg (1913–1990)

Jarlo debutis en 1964 kun la poemaro "Tablo, pretigu vin!" je 61 paĝoj kaj faris al si nomon kiel konkretcan poeton.

Interesa epizodo de tiu tempo okazis en 1965, kiam Jarlo havis ekspozicion en Galerio Karlsson, arta galerio por samtempa arto, kie la polico unue fermis la ekspozicion, sed poste malfermis ĝin denove.

Tiele la Ŝtataj Publikaj Esploroj 2002:90 komencas sian tekston pri la "Militservo-



## Minnesord om Jarl Hammarberg

*av Mikael Krall, psikolog och god vän till Jarl Hammarberg. På Facebook har han lagt in följande minnesord, som jag /Siv/ fick tillåtelse att kopiera.*

Kära vänner!

I fredags, den 25/1, avled min vän Jarl Hammarberg. Detta skedde vid 4-tiden på morgonen, och hans hustru Kirsten var med honom då.

Jarl var känd som författare, poet och bildkonstnär. Jarl var dessutom vegan, pacifist (vägrade helt att göra militärtjänsten), esperantist och intresserad av den danske

författaren och mystikern Martinus.

Jag tror att de flesta som kände Jarl kallade honom för Jarlo, som var hans esperantonamn. När han skrev poesi på esperanto kallade han sig Jarlo Martel-Monto.

Jarlo föddes i Göteborg 22 november 1940. Fadern var orgelbyggaren Nils Hammarberg (1913–1991) och modern Daga Hammarberg (1913–1990).

Jarlo debuterade 1964 med diktsamlingen "Bord, duka dig" på 61 sidor och gjorde sig ett namn som konkretistisk poet.

En intressant episod från den tiden ägde rum 1965, då Jarlo hade en utställning på Galleri Karlsson, ett konstgalleri för samtida konst, där polisen först stängde utställningen, men sedan öppnade den igen.

Så här inleder Statens offentliga utredningar

rezista Movado” sub la ĉefa rubriko ”La danĝera pacomovado”:

”En Januaro 1965 la polico estis alvokita al Galerio Karlsson en Stokholmo.

La kaŭzo estis ke la poeto kaj artisto Jarl Hammarberg je sia unua solo-ekspozicio estis eksponita aŝiŝon kun la teksto ”Rifuzu mortigi, rifuzu militservon”.

La aŝiŝteksto povus en la senco de la leĝo esti rigardata kiel agitato, pro kio la polico konfiskis la aŝiŝon.

La interveno kontraŭ Hammarberg rezultigis multajn simpatiajn manifestiĝojn. I. a. aperis apelacio en la ĵurnalaro, subskribite de 37 elstaraj kultureminentuloj.

Verkistoj, reĝisoroj kaj aktoroj kiel Werner Aspenström, Karl Wennberg kaj Alf Sjöberg per la apelacio malkonsentis de la krimigo de la admonoj al militrifuzo.

Hammarberg estis akuzita kaj pli malfrue kondamnita al monpuno, (proporcia al la ĉiutaga enspezo), pro agitado.

En majo 1965 estis eldonita debatlibro, kiu ankaŭ fariĝis tre priskribita kaj debatita. ”Rifuzi mortigi, rifuzi militservon” enhavis aldonojn i. a. de Jan Myrdal, Ingemar Hedenius kaj Lars Gustafsson.

Kovrilpaĝa bildo de la libro estis la konfiskita aŝiŝo de Hammarberg.

”Mi pensas, ke mi por la unua aŭ dua fojo renkontis Jarlon en Jarkunsido de la Sveda Paca kaj Arbitracia Societo komence de la 90a jardeko.

Ni volis diskuti iun pacproblemon. Kaj Jarlo kaj mi tute rifuzis la militservon.

Mi pensas ke Jarlo fariĝis vegano jam en la 70a jardeko, se mi ne erare memoras, ĉiuokaze li membriĝis al la Vegana Asocio nur kelkajn monatojn post ĝia fondiĝo en julio 1976 kaj li apogis ĝin dum ĉiuj jaroj kaj li

2002:90 sin text om ”Värnpliktsvägrar-rörelsen” under huvudrubriken ”Den farliga fredsrörelsen”:

”I januari 1965 kallades polis till Galleri Karlsson i Stockholm.

Anledningen var att poeten och konstnären Jarl Hammarberg i sin första ensamutställning ställt ut en affisch med texten ’Vägra döda, vägra värnplikt’.

Affischtexten kunde i lagens mening betraktas som uppvigling varför polisen beslagtog plakaten.

Ingripandet mot Hammarberg gav upphov till en mängd sympatyttringar. Bl. a. publicerades i dagspressen i januari 1965 ett upprop undertecknat av 37 kulturpersonligheter.

Författare, regissörer, konstnärer, och skådespelare som Werner Aspenström, Karl Wennberg och Alf Sjöberg tog i uppropet avstånd från kriminaliseringen av uppmaningar till värnpliktsvägran.

Hammarberg åtalades och dömdes sedermera till dagsböter för uppvigling.

I maj 1965 utkom en debattbok som också blev mycket omskriven och debatterad. Att vägra döda, att vägra värnplikt innehöll bidrag av bl. a. Jan Myrdal, Ingemar Hedenius och Lars Gustafsson.

Omslagsbild till boken var Hammarbergs beslagtagna affisch.

”Jag tror att jag träffade Jarlo första eller andra gången på en årsstämma för Svenska Freds- och Skiljedomsföreningen i början av 90-talet.

Vi skulle diskutera någon fredsfråga. Både Jarlo och jag hade totalvägrat militärtjänsten.

Jag tror Jarlo blev vegan redan på 70-talet om jag inte minns fel, i vilket fall blev han medlem i Veganföreningen bara någon



partoprenis en kelkaj vegankunvenoj; do, en la veganismo ni ankaŭ havis ion komunan.

Jarlo skribis tridekon da libroj, kelke da ili li skribis kune kun la poetino Sonja Åkesson, kun kiu li estis edziĝinta inter 1966 kaj 1977.

Jarlo ankaŭ skribis teatraĵojn. Mi vidis teatraĵon aŭ scenprezentadon de Jarlo, ekspozicion kaj trifoje mi aŭskultis, kiam li laŭtlege siajn poemojn.

La laste menciitaj estis aŭ vortoj kunligitaj en malfacile komprenebla modo, aŭ estis sonado kombinita kun aparatsonoj.

Mi memoras kiam Jarlo ĉeestis mian 40-jaran festenon en 2004 en la lokalo de la ordeno de la Templokavaliroj en Gotenburgo. Li tiam sidis sur la rando de la scenejo kun sia longa hararo, barbo, sia teksto kaj eta kuirejmaŝino (miksilo).

Ne-lingvaj vortoj neatendate venis el lia buŝo kaj kiel interludo aŭ kiel akompano Jarlo ludis sonojn de la kuireja miksilo. Kelkaj el la aŭskultantaro devis klopodi kaŝi ke lia prezento igis la ridmuskolojn aktiviĝi – ne kutimiĝintaj kiel ili estis de la ekstrema rando de la arto.

Jarlo havis sanproblemojn la lastajn jarojn, plej rimarkeble per la malfacileco paŝi.

Post la somero lastjare Jarlo havis malfacilecon prizorgi sin mem kaj li translokiĝis al loĝado, samtempe kiam lia edzino Kirsten restis kaj restas en la gepatra hejmo de Jarlo, kie oni iam fabrikis orgenojn kaj kie la solvelisto Sven Lundin konstruis velŝipon sur la unua etaĝo de la domo.

La du lastajn monatojn Jarlo havis malfacilecon esprimi sin, eĉ se li komprenis. Tiam li anstataŭ la sveda parolis ne tute klaran esperanton, sed se li vere volis esprimi ion, tiam li diris tion en la sveda. La lastajn semajnojn Jarlo ankaŭ ne povis iri. Li havis febron la lastajn tagojn. Kaj lastan

månad efter att den hade bildats i juli månad 1976 och stöttat den i alla år och varit med på en del veganträffar; så i veganismen hade vi också något gemensamt.

Jarlo skrev ett 30-tal böcker, ett par av dem skrev han tillsammans med poeten Sonja Åkesson, som han var gift med mellan 1966 och 1977. Jarlo har även skrivit pjäser. Jag har sett en pjäs eller ett scenframträdande av Jarlo, en utställning och vid tre tillfällen lyssnat när han läst sina dikter. De sistnämnda har antingen varit ord sammanfogade på ett svårbegripligt sätt eller varit ljudanden kombinerade med apparatljud. Jag minns när Jarlo var på mitt 40-årskalas 2004 i Tempelriddarordens lokal i Göteborg. Han satt då på scenkanten med sitt långa hår, skägg, sin text och en liten köksmaskin (mixer).

Ospråkliga ljud kom oväntat ur hans mun och som mellanspel eller som ackompanjemang spelade Jarlo ljud från köksmixern. En del av gästerna fick anstränga sig för att dölja att hans framträdande fick skrattmuskulerna att aktivera sig – ovana som de var av konstens ytterkanter.

Jarlo har haft det svårt med hälsan de senaste åren, mest märkbart i svårigheterna att gå.

Jarlo fick efter sommaren förra året svårt att ta hand om sig själv och flyttade till ett boende medan hustrun Kirsten var och är kvar i Jarlos föräldrahem där man en gång i tiden tillverkade Hammarbergorglarna och där ensamseglaren Sven Lundin byggde en segelbåt på andra våningen i huset.

De senaste två månaderna hade Jarlo svårt att uttrycka sig även om han förstod. Talade då inte helt tydlig esperanto istället, men om han verkligen ville få något sagt då sa han det på svenska. De senaste veckorna kunde Jarlo inte heller gå. Hade feber de sista dagarna.

vendredon, tiel dirite, Jarlo forlasis la surteran vivon.

Jarlo estis tre afabla kaj humila viro, kiu vivis siajn idealojn kaj do estis aktiva je diversaj kuntekstoj, kiel verkisto, artisto kaj esperantisto, sin baziĝanta sur sia konvinko pri paco, veganismo kaj spiritecon.

Dankon pro ĉio, Jarlo! Ni revidos nin denove, se la mistikistoj pravas!

Och i fredags lämnade Jarlo som sagt jordelivet.

Jarlo var en mycket vänlig och ödmjuk man som levde sina ideal och var alltså aktiv i olika sammanhang, som författare, konstnär och esperantist, vilandes i sin övertygelse om fred, veganism och andlighet.

Tack för allt, Jarlo! Så ses vi igen, om mystikerna har rätt!



## Purstila ceremonio por Ebbe Vilborg 1 februaro 2019



*Margareta Andersson, Helfrid Karlsson och Siv Burell deltog från Göteborgs Esperantoförening. Aino Åberg var också anmäld, men befann sig vid tillfället på sjukhus.*

*Officiant: Gunilla Jutvik.*

## En stilren ceremoni för Ebbe Vilborg 1 februari 2019 i Örgryte nya kyrka



**Ebbe Vilborg vizitis konversacian kurson pri esperanto en 2007 kaj prelegis pri sia laboro pri la esperanta etimologio. /Siv**



*Kie oni povas paroli esperanton regule? Eble je la renkontoj de la kluboj, sed ofte oni elektas la svedan por ke ĉiu komprenu.*

*En la studejo de Vuxenskolan, Karl Gustavsgatan 15, en la centro de Gotenburgo, ni komencis konversacian studrondon en januaro 2007. Kaj preskaŭ ĉiuj daŭrigis la renkontojn po sep aŭ ok vendredoj en ĉiu studsezono. Ĉiu kontribuis al la programo per prelegetoj, skribaĵoj aŭ lingvoludoj.*

*La 2an de oktobro ni havis invititan gaston – **Ebbe Vilborg**.*

*12 aŭskultantoj ĝuis la prelegon pri la originoj de kelkaj E-vortoj. Mi petis la tekston, kaj nun ankaŭ vi povas ĝui ĝin.*

*En la fino estas demando, al kiu vi povas doni komenton.*

*Bonan legadon!*

*Siv Burell*

**Ebbe Vilborg:**

*Estas agrable viziti tiun ĉi rondon, ĉar mi ŝatas ĝian labormetodon: aŭskulti esp-an tekston kaj poste diskuti ĝian enhavon.*

**Ebbe Vilborg besökte en konversationskurs i esperanto 2007 och föreläste om sitt arbete med esperanto-etymologi. /Siv**



*Var kan man tala esperanto regelbundet? Kanske vid klubbssammankomster, men ofta väljer man svenska för att alla ska förstå.*

*I Vuxenskolans studielokal på Karl-Gustavsg. 15 i Göteborgs centrum, startade vi en konversationscirkel i januari 2007 och nästan alla fortsatte att komma på träffarna 7 eller 8 fredagar per termin. Alla bidrog till programmet med föreläsningar, något skriftligt eller med språklekar.*

*Den 2 oktober hade vi en inbjuden gäst, **Ebbe Vilborg**.*

*12 åhörare njöt av föredraget om ursprunget av några esperantoord. Jag bad att få texten, och nu kan också du njuta av den.*

*I slutet finns en fråga, som du kan kommentera.*

*Trevlig läsning!*

*Siv Burell*

**Ebbe Vilborg:**

*Det är trevligt att besöka den här cirkeln, för jag gillar dess arbetsmetod: att lyssna till esperantotexter och sedan diskutera innehållet.*



Siv donis al mi liberan elekton de temo hodiaŭ. Mi elektis paroli iom pri mia laboro rilate la originon de esp-aj vortoj.

Mi havis kontakton kun e-o relative frue en mia vivo, ĉar mia patro aĉetis lernolibron pri e-o. Li neniam legis ĝin, sed mi sciis, ke ĝi ekzistas en la libroŝranko.

Kiam mi unuafoje komencis lerni eksterlandan lingvon en la lernejo (temis pri la germana, ĉar ĝi estis tiutempe la unua lingvo en la svedaj lernejoj), mi komencis foliumi en la esp-a lernolibro kaj sur la unuaj paĝoj konstatis, ke multaj vortoj estis samaj kiel la svedaj plus -o: piano estas instrumento, tigo estas besto, motoro estas maŝino ktp.

Tio vekis en mi simpatian por eo. Mi ankaŭ konstatis, ke la libro helpis min gramatike: kiam mi devis lerni la akuzativon en la germana lingvo, mi samtempe komprenis la rolon de la akuzativo en eo.

Mi fakte lernis e-on dum la jaroj de la milito – tre maloportune, ĉar tiam la internacia komunikado estis tre malgranda kaj ne multaj esp-aj societoj funkciis.

Tamen en Gotenburgo vivis pioniro Oskar Svantesson, kiu malgraŭ ĉio aranĝis malgrandajn kursojn, kaj kiam finiĝis la milito mi iom bone sciis eon.

Mi partoprenis la kongreson de Malmö 1948, kaj tio estis mia eniro en la esp-an mondon. Mi ankaŭ diru ke mi persvadis mian patron malfermi sian lernolibron; li estis kun mi en Malmö. Iom strange, ankaŭ mia avo komencis studi eon. Do en mia familio la esperantaj studoj funkciis nenature: de filo per patro ĝis avo.

Nu, kelkaj e-aj vortoj havas germanan originon, ofte gravaj kaj ĉiutagaj: lerni, vorto, danki, bildo, fali, jaro, knabo, varma. Ni svedoj kompreneble dankas pro tio; ni ja

Siv gav mig friheten att välja tema för idag. Jag valde att tala om mitt arbete om esperantoordens ursprung.

Jag kom i kontakt med esperanto relativt tidigt i mitt liv, därför att min far köpte en lärobok i esperanto. Han läste den aldrig, men jag visste att den fanns i bokskåpet.

När jag för första gången började lära mig ett främmande språk i skolan (det handlade om tyska, för på den tiden var tyska det första främmande språket i de svenska skolorna) så började jag bläddra i esperanto-läroboken och på de första sidorna konstaterade jag att många ord var desamma som de svenska plus -o: piano estas instrumento, tigo estas besto, motoro estas maŝino osv.

Detta väckte hos mig sympati för esperanto. Jag konstaterade också, att boken hjälpte mig grammatiskt: när jag skulle lära mig ackusativ i tyska, förstod jag samtidigt ackusativets roll i esperanto.

Jag lärde mig faktiskt esperanto under krigsåren – mycket besvärligt, därför att den internationella kommunikationen var mycket liten och inte många esperantoföreningar fungerade.

Men i Göteborg levde pionjären Oskar Svantesson, som trots allt ordnade små kurser, och när kriget var slut kunde jag esperanto ganska bra.

Jag deltog i Malmökongressen 1948, och det blev mitt inträde i esperantovärlden. Jag ska också säga att jag övertalade min far att öppna sin esperanto-lärobok; han var med mig i Malmö. Märkligt nog började också min farfar att studera esperanto. Alltså fungerade esperantostudierna tvärt emot det vanliga: från en son genom en far till en farfar.

Nåväl, några esperantoord har tyskt ursprung, ofta viktiga och vardagliga ord: lerni, danki, bildo, fali, jaro, knabo, varma. Vi svenskar tackar förstås för det, därför att vi ju

rekonas la plej multajn el tiuj vortoj en nia propra lingvo.

Sed por konstati la originon de aliaj vortoj necesas informiĝi pri tio, kiujn lingvojn Zamenhof sciis, ĉar eo ja estas unuvira lingvo. Certe estas ke unu el la grandaj eŭropaj lingvoj Z. ne sciis, nome la hispana. Li neniam kaj nenie menciis la hispanan kiel unu el liaj lingvoj.

Sed kompreneble li sciis ne nur la germanan sed ankaŭ la francan kaj la anglan. Plue, la pola kaj la rusa estis lingvoj de lia ĉirkaŭaĵo. En la lernejo li poste studis la latinan kaj la grekan. Kiel judo li ankaŭ lernis la hebrean kaj la jidan (jiddish), lingvo parolata de la polaj judoj. Ĝi cetere hodiaŭ havas la rangon de oficiala lingvo ankaŭ en nia lando. Tiuj naŭ lingvoj certe estis sufiĉaj por trovi vortojn por internacia lingvo, ĉu ne?

Tre saĝe Z. volis antaŭ ĉio preni vortojn internaciajn, konatajn en multaj landoj. Tamen, bedaŭrinde, la ĉiutagaj vortoj ja ne estas tiaj.

Sed – ĉu oni ne povas krei vortojn kaj ignori ekzistantajn lingvojn? Certe. Ĉiuj scias ke la fama tabelo en esperanto – *kiu, kio, kie, kiam* ktp – estas artefarita, sed praktika. Cetere, ankaŭ se oni fabrikas vortojn, ili devas esti inspiritaj de io.

La Kiu-serio estas certe influita de francaj vortoj: *kiu* estas *qui* en la franca, *kiam* estas *quand* ktp.

Iom facilmaniere oni ofte diras ke esperanto konsistas je okdek procentoj de romanaj vortoj, inkluzive la latinan, kaj dudek procentoj de ĝermanaj; slavaj vortoj apenaŭ estas troveblaj. Do nia internacia lingvo havas okcidenteŭropan karakteron.

Mia intereso pri origino de vortoj kreskis daŭre, kaj mi konstatis ke tiu branĉo fakte estas speciala scienco en la lingvoscio, kun la nomo etimologio. Etimologio estas greka

känner igen de flesta av dessa ord i vårt eget språk.

Men för att konstatera ursprunget av andra ord är det nödvändigt att få veta vilka språk Zamenhof kunde, för Esperanto är en mans verk. Säkert är att Zamenhof inte kunde ett av de stora europeiska språken, nämligen spanska. Han nämnde aldrig och ingenstans spanska som ett av sina språk.

Men självklart kunde han inte bara tyska utan också franska och engelska. Vidare var ju polska och ryska språk som fanns i hans omgivning. I skolan studerade han sedan latin och grekiska. Eftersom han var jude lärde han sig också hebreiska och jiddisch, ett språk som talades av de polska judarna. Idag har det för övrigt rang av officiellt språk också i vårt land. Dessa nio språk var säkert tillräckliga för att finna ord för ett internationellt språk, eller hur?

Klokt nog ville Z framför allt ta internationella ord, som var kända i många länder. Men tyvärr var inte vardagsorden internationella.

Men – skulle man inte kunna skapa ord och strunta i de existerande språken? Säkert! Alla känner till att den berömda esperantotabellen – *kiu, kio, kie, kiam* osv – är konstgjord, men praktisk. För övrigt, också om man hittar på ord, måste de ju vara inspirerade av något.

Kiu-serien är säkert influerad av franska ord: *kiu* är *qui* på franska, *kiam* är *quand* osv.

Något förenklat säger man ofta att esperanto består av 80 % romanska ord, inklusive latinska, och 20 % av tyska. Slaviska ord går knappast att finna. Alltså har vårt internationella språk till 80 % västerländsk karaktär.

Mitt intresse för ordens ursprung har hela tiden ökat och jag har konstaterat att denna gren faktiskt är en speciell vetenskap, som kallas etymologi. Etymologi är ett grekiskt

vorto, kiu signifas "la studo de la vero", ĉar la antikvaj grekoj iom naive kredis ke: se oni scias la originon de vorto, oni scias ĝian veran signifon. Tio tute certe ne estas vera!

Nu, ĉiu grava lingvo havas sian etimologian vortaron – krom esperanto, mi konstatis kun bedaŭro. Kaj mi decidis ŝtopi tiun breĉon.

Tio estis fatala decido, kiu kaŭzis dekjaran laboron.

Nuntempe mi ne komprenas, ke mi aŭdacis komenci tiun taskon ekstreme temporaban. Ĝi postulis serĉadon en multaj libroj kaj kolosan korespondadon. Plej malfacile estis serĉi kaj trovi artikolojn en diversaj revuoj; estis neeble aboni revuojn de la tuta tero.

Golden, unu el la plej aktivaj etimologoj en Esperantujo, havis la principon neniam verki artikolojn dufoje en la sama revuo.

Sed eo havas unu specialan avantaĝon antaŭ aliaj lingvoj: ĝi havas t. n. oficialajn vortojn, tiujn kiuj troviĝas en la fundamento kaj ties aldonoj. Do mi certe sciis kiujn vortojn mi pritraktu.

Je mia ĝojo nia sveda eo-eldonejo akceptis la ideon kaj poste eldonis la verkon en kvin kajeroj.

La unua publikiĝis en 1991, la lasta en du mil unu. La eldono preskaŭ ĉesis post la kvara volumo; io okazis en la eldonejo kio kaŭzis atendadon de la lasta kajero dum kvin jaroj.

La apero de mia etimologio havis tute neatenditan rezulton: ĝi inspiris aliajn fari la samon, kaj nun eo posedas tri–kvar etimologiajn leksikojn. Jen la verko de Cherpillot el Francio kaj la verko de Yamasaki el Japanio. Unu estas "konciza", la alia estas "pragmata"; kio tion ekzakte signifas, mi fakte ne scias. Sed en ambaŭ enestas multe pli da esp-aj vortoj ol en mia, ĉar la verkintoj ne haltis ĉe la oficialaj vortoj; ili enmetis ankaŭ aliajn. Kio tamen mankas en tiuj du

ord, som betyder "studiet av verkligheten", för de antika grekerna trodde något naivt att: om man vet ett ords ursprung, vet man dess verkliga betydelse. Det är förvisso inte sant.

Nåja, alla viktiga språk har sin etymologiska ordsamling – utom esperanto, konstaterade jag med beklagan. Och jag bestämde mig för att täppa till den här bristen. Det var ett ödesdigert beslut, som medförde ett tioårigt arbete.

Numera förstår jag inte hur jag vågade ta itu med denna mycket tidsödande uppgift. Den fordrade ett evigt sökande i många böcker och en kolossal korrespondens. Svårast var det att söka och finna artiklar i olika tidskrifter; det var omöjligt att prenumerera på tidskrifter från hela världen.

Golden, en av de mest aktiva etimologerna i esperantovärlden, hade principen att aldrig skriva artiklar två gånger i samma tidskrift.

Men esperanto har en speciell fördel framför andra språk: det har s. k. officiella ord, de som finns i Fundamentet och dess tillägg. Alltså visste jag vilka ord jag skulle ge mig i kast med.

Till min glädje accepterade mitt svenska esperanto-förlag idén och gav senare ut verket i fyra häften.

Det första publicerades 1991, det sista 2001. Utgivningen upphörde nästan efter den fjärde volymen; något hände på förlaget, vilket orsakade att vi fick vänta på det sista häftet i fem år.

Utgivningen av min etymologi fick ett oväntat resultat: det inspirerade andra att göra samma sak, och nu har esperanto tre–fyra etymologiska lexikon. Nu finns ett verk av Cherpillot från Frankrike och ett av Yamasaki från Japan. Ett är "koncist", det andra "pragmatiskt"; vad det exakt betyder, vet jag faktiskt inte. Men i båda finns det många fler



libroj estas la diskuto, kiu ĉeestas en la mia preskaŭ ĉe ĉiu vorto.

Ĉu tiuj verkoj do klarigas la originon de ĉiuj esperantovortoj? Nu, ne ĉiuj. Restas eta grupo, kiu ŝajnas nesolvebla.

Kaj ĉi tie oni devas demandi: kial la e-istoj ne intervjuis Z. kiam li ankoraŭ estis en la vivo? Mi absolute ne komprenas tion.

Z. volonte parolis pri sia lingvo kaj certe respondus.

Ne demandi lin estas grava neglekto, miso kiu lasis enigmojn al venontaj generacioj.

Fine mi volas paroli pri du el tiuj enigmoj. Temas pri vortoj, kiuj ĉiuj el ni uzas de tempo al tempo: *edzo* "make" kaj *tuj* "med detsamma, genast, omedelbart".

Pri la unua Z. fakte donis klarigon; la problemo estas ke ni ne kredas lin. Li diris, ke komence ne temis pri viro – edzo – sed pri la virino – edzino. Tiun vorton li prenis el la germana *Kronprinzessin*, facila por ni svedoj kiuj ja diras *kronprinsessa*.

Ĉar ŝi estas ligita al la kronprinco, ŝia titolo povis signifi "hustru".

Poste el la vorto *edzino* li tute logike faris la vorton *edzo* "make".

Kial ni do ne kredas al Z? Nu, ĉar *ne ĉiu princino estas edzino kaj eĉ malpli ofte edzino estas princino!* Kaj krome: de kie venas do: edzino?

Kelkaj trovis en la jida vorton, kiu signifas "edzino de rabeno"; ĝi havas plurajn formojn: *rebedzin*, *rabbetse* ktp. Z. ja ne volis rekoni, ke li iam pruntis vortojn de la jida. Ni ne scias.

Al la alia: *tuj* ekzistas en neniuj lingvoj. La francoj diras *tout de suite*, sed tio ŝajnas tro brutala deformato kaj ne klarigas la *jo*.

En la litova lingvo troviĝas vorto *tuoj* kun la sama signifo (mi ne ekzakte scias la prononcon), kaj iu trovis dialekton litovan,

esperantooord an i mina, därför att författarna inte stannade vid de officiella orden; de tog också in andra. Vad som dock saknas i dessa två böcker är diskussionen, som finns i min vid nästan varje ord.

Klargör dessa verk alltså ursprunget till alla esperantooord? Nåja, inte alla. Det återstår en liten grupp, som verkar omöjliga att klara av.

Och här måste man fråga sig: varför intervjuade inte esperantisterna Z, medan han fortfarande var i livet? Det kan jag absolut inte förstå.

Z. talade gärna om sitt språk och skulle säkert ha svarat.

Att inte ha frågat honom är ett stort misstag, ett misstag, som lämnar en gåta till kommande generationer.

Till slut vill jag tala om två av dessa gåtor. Det handlar om ord, som vi alla använder då och då:

"*edzo*", make och "*tuj*" med detsamma, genast, omedelbart.

Om det första gav faktiskt Z en förklaring; problemet är att vi inte tror honom. Han sa att det ursprungligen inte handlade om en man – *edzo* – utan om en kvinna – *edzino*. Det ordet tog han från det tyska *Kronprinzessin*, lätt för oss svenskar som ju säger kronprinsessa.

Därför att hon var lierad med kronprinsen, kunde hennes titel betyda "hustru".

Senare gjorde han av ordet *edzino* helt logiskt ordet *edzo*, "make".

Varför tror vi då inte Z? Nåväl, därför att *inte varje prinsessa är en hustru och ännu mer sällan är en hustru en prinsessa!* Och för övrigt: varifrån kommer då: *edzino/hustru*?

Några har funnit i jiddisch ett ord som betyder "hustru till en rabbin"; det har åtskilliga former: *rebedzin*, *rabbetdse* osv. Z

kiu havas la prononcon *tuj*. La problemo estas ke Z. ne sciis la litovan.

Sed, diras iu, Z. laboris certan tempon kiel kuracisto en urbo de Litovio: eble li lernis kelkajn frazojn; ekzemple la frazo "Venu tuj" povis esti dirata ofte al kuracisto. Tiel oni povas diskuti tien kaj reen sen atingi certan rezulton.

Sed ĉiuj konstatas ke TUJ estas tre efika vorto, multe pli ol la franca *tout de suite* aŭ la angla *immediately*.

Kaj tio, ĉu ne, estas kion ni deziras: Eo kiel efika lingvo!

Parolinte pri la etimologiaj verkoj oni certe povas diskuti ĉu ili estas necesaj por espo aŭ nur estas speco de amuzo por lingvoamantoj. Kaj tiun demandon mi volas direkti al vi: necesa aŭ nur amuza? ☺

---



ville inte kãnas vid att han någonsin lånat ord från jiddisch. Vi vet inte.

Så till det andra ordet: *tuj* finns inte i något språk. Fransmännen säger *tout de suite*, men det skulle vara en alltför brutal omformning och förklarar inte j:et.

I litauiskan finns ordet *tuoj* med samma betydelse (jag vet inte det exakta uttalet) och någon har funnit en litauisk dialekt, som har uttalet *tuj*. Problemet är att Z inte kunde litauiska.

Men, säger någon, Z arbetade en viss tid som läkare i en stad i Litauen, kanske lärde han sig några fraser; t. ex. kunde frasen "Kom genast" ha sagts ofta till en läkare. På så sätt kan man diskutera hit och dit utan att få ett säkert resultat. Men alla konstaterar att TUJ är ett effektivt ord, mycket mer än det franska *tout de suite* eller det engelska *immediately*.

Och detta är väl vad vi önskar: Esperanto som ett effektivt språk!

Då man har talat om etymologiska verk kan man säkert diskutera om de är nödvändiga för esperanto eller bara ett slags nöje för språkålskare. Och denna fråga vill jag rikta till er: nödvändigt eller bara roligt? ☺

---

## Konversacia kurso en Herzberg, Germanio 18–22 marto 2019



Zsófia Kóródy

**NOVA OFERTO:** Internacia konversacia Esperanto-kurso 18–22.03.2019 en Esperanto-Centro Herzberg. Tutsemajna intensa lernado en ĉiutagaj vivsituacioj, dum promenado, ekskursoj, ktp. Laŭ bezono ankaŭ agnosko kiel VHS-kurso (Bildungsurlaub). Vidu detalojn kaj bildojn de antaŭjara kurso. Aliĝu ĉe [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

### Interkultura Centro Herzberg

<http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=42117099>

Grubenhagenstraße 6, 37412 Herzberg am Harz – La Esperanto-urbo, Germanio

Telefono: +49 5521 5983